

BEOGRADA VERDA SIFLO

Jaro II

Beogrado, majo-aŭgusto 2007

n-ro 2(3)

KORIFEOJ DE BALKANLANDA REVOLUCIO

Dum historia evoluo de balkanlandaj popoloj, per reciproka influo de multflankaj tradicio kaj kulturo inter la serba kaj greka popoloj, korifoo leviĝas greka patriota poeto kaj revoluciulo Rigas Fereos (1757-1798) kaj serba ribelula gvidanto (*vožd*) Karađorđe (1762-1817). Ĉi jare, dum la monatoj junio kaj julio, oni rememoris 250 jarojn de la naskiĝo de Rigas kaj 190 jarojn de la martira morto de Karađorđe.

En liberigaj koordinatoj kiujn ili du fondis fine de la 18-a kaj en la unuaj jardekoj de la 19-a jarcento eĉ hodiaŭ baziĝas konstanta amikeco kaj kunlaboro de la serba kaj greka popoloj.

Liberiga semo kiun dissemis la neforgesebla Rigas ĝermis unue en la serba ribelo sub la gvidado de glora Karađorđe kaj tiu „serba modelo” montris, ke unu tiel malgranda popolo povas superi kaj detruigi multjarcentan turkokration en Balkano. Tio okazis dum la periodo, en kiu balkanlandaj popoloj estis gvidataj ne nur politike sed ankaŭ per libereca inspiro.

La ribelo de la serba popolo (1804) estis samtempe enkonduko en grandajn popolajn leviĝojn kaj liberigajn movadojn kia estis la greka insurekcio por liberiĝo kaj sendependeco (1821).

D-ro Miodrag Stojanović

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word- aŭ PDF-dokumento
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)
Aperas trifoje jare

Ĉefredaktoro: d-ro Miodrag Stojanović, **Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov, Agnesa Eremija, Mirjana Šundeke, Etelka Kiš-Jakupović, Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilković, Branko Despotović, Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina, **Teknika redakto:** Adem Jakupović

Originala prozo

DAVIDO KAJ GOLIATO

Fine la lastaj neĝoj malaperis kaj abunda verdaĵo anstataŭis koton kaj grizecon de la nuda tero. Ĉie ĉirkaŭe ekkreskis herbo kaj kamparaj floroj, arbustoj sin vestigis verde samkiel arboj. Eĉ arbaraj vojetoj estas verdaj. Belega vidaĵo. Kvankam oni diras ke serpentoj ĉi tie estas raraj, mi ĉiam singardeme paŝas tra herbo ĉar tiuj rampuloj tre timigas min. Tial mi ĉiam rigardas atente kie mi iras.

Antaŭ kelkaj tagoj mi promenis matene kaj, kiel kutime, ĝuis la belan naturon, spiris per plenaj pulmoj kaj sentis min trankvila kaj tre kontenta sub la varma printempa suno. Sed ankaŭ iu alia estaĵo ĝuis mildan printempan varmecon. Ĝia malgranda kapo kaŝe elrigardetis el truo sur vojeto. Ĝi estis senmova, kiel morta, sed estis tiel intense verda ke eĉ sur la verda herbo ĝi estis tre bone videbla. Mi haltis kaj rigardis, pensante ĉu estas lacerto aŭ, Dio savu, malgranda serpento. Kvankam scivolema, mi lasis mian dilemon flanken kaj daŭrigis promeni.

Sekvantan matenon, en la sama loko mi vidis besteton, ĉifoje iom pli elirinta el la truo, sed denove mi ne povis ĝuste konkludi kio ĝi estas. Scivolemo superis la timon, mi prenis iun bastoneton kaj tuŝis hezitante la kapon de tiu verda estaĵo por vidi sed mi ne havis tempon por pensi pri tio plu, la besteto tuj ekkuregis ĝuste al miaj piedoj, mi ekkriis, eksaltis, kaj, bonŝance, vidis ke temas pri lacerto kiu tuj malaperis ien.

La konduto de la lacerto surprizis min. Mi tute ne atendis, ke ĝi forkuros en mian direkton, por mi pli logike estus, se ĝi kurus rekte, for de mi. Kaj tuj mi rememoris iun libron, en kiu mi tralegis ion tute similan al konduto de la lacerto. Nome, ĉefa persono en tiu libro estis en danĝera situacio kiam li troviĝis en iu malvasta strateto kun kelkaj krimuloj antaŭ si kiuj deziris prirabi lin. Li pripensis kiel savi sin kaj li elektis strangan manieron por tion fari. Li rapidege ekkuregis tra la vico de krimuloj, li forkuris ĝuste al ili, profitis elementon de surprizo kaj sukcesis eskapi.

La lacerto certe ne pensis kion fari, ĝi tion faris instinkte kaj ni, homoj, meditaj estaĵoj, povas nur lerni de la naturo kaj de estaĵoj vivantaj direkte en ĝi.

Promenante post tiu okazaĵo, mi rememoris iun veran propran travivaĵon kaj vi devas nepre kredi al mi, ĉar tio estis mia propra sperto. Kvankam knabineto de ses, sep jaroj en tiu momento, mi ĝis nun havas preskaŭ ŝtonigitan bildon en mia kapo.

Tio okazis en la domo, en kiu mi estis naskita. Bela domo estis kun granda korto. Mi ĉiam havis hundon kaj katon. Mi forgesis la nomon de la kato, sed mi vidas tre vive ĝin sur la vojeto de mia ĝardeno kaj antaŭ ĝi malgrandan muson starantan sur malantaŭaj piedoj, turniĝantan al la kato kaj kun antaŭaj piedoj ĝi minacis la katon. En grandega malespero ĝi provis esti kuraĝulo, ĝi minacis la bestegon antaŭ si sciante ke ĉio estas vana. Nun, kiam mi skribas pri tio, mi sentas respekton al malgranda muso kaj nun mi scias ke ĝi provis savi sin, mi pensas pri ĝi kun malĝojo kaj ankaŭ kun admirego. Sed en momento kiam mi estas knabino, mi nur registris la scenon, sen movo, sen deziro ŝanĝi situacion, sen doloro en la koro. Naiva kaj benata juneco. Mi certe ne estis sensentema kaj kruela en mia koro, sed simple, mi estis nur spektanto, mi profunde sorbadis ĉion okazantan antaŭ miaj okuloj, kaj nenio plu. Feliĉa tempo, de longe rapide pasis.

Vesna Džonić (Aŭroro)



STEFANO ŜTELET

Aĉsorta Stefano Ŝtelet, fama ŝtelisto de ovoj kaj kokoj, jam la trian tagon ne gustumis panon. Li estis persekutata kaj serĉata dum lastaj sep tagoj, ĉar la distriktestro promesis „grasan premion“ por kapti lin. Li ne estis vere danĝera rabisto, sed la loĝantaro de ĉiuj ĉirkaŭaj vilaĝoj postulis de la distriktestro ĉesigon de liaj pli tedigaj ol domaĝigaj agoj.

Bela, plensuna aŭtuna tago ekbrilis jam de la fruaj horoj. Stefano, tranoktinta en la apudvoja arbareto, etendis la frostigitajn membrojn kaj ekstremis. Kvankam la tutan nokton li ne tremis, nun, kontraŭ la varmigantaj lin radioj de la aŭtuna suno, li sentis malvarmon. Ĉu malvarmon?... Eble malsaton?... Ne! Li manĝis sufiĉe, kvankam ne panon. La arbaro ja estas plena de diversaj bongustaj fruktoj. La kratagberoj estas sufiĉe dolĉaj kaj satigaj. Precipe tiuj nigraj estas pli bongustaj ol la ruĝaj. Krome ekzistas ankaŭ dolĉaj sovaĝaj piretoj, ne pli grandaj ol ĉerizoj, sed vere pli bongustaj kaj bonodoraj ol ĉiuj aliaj piroj. Kaj ili kaj la kratagberoj povas pli bone satigi homon ol iu ajn senpana manĝaĵo. Do, ne ekstremis Stefano pro la malsato... Sed kial li ekstremis? ... Li ekpensis profunde kaj respondis al si mem:

– Mi timas...

Eldirinte tion li eĉ pli forte ekstremis, ĉar li vere ektimis eĉ la timon. Li sciis ke la timo estas plej danĝera malamiko por la homoj, precipe por malbonuloj. Stefano ekkoleris. Li decidis esti pli aŭdaca, eliri el la arbaro, renkonti iun paŝtisteton, preni de li panon kaj amikiĝi kun li. Li ekiris al la ŝoseo.

Ĉe la rando de la arbaro sidis viro, kies dorson ekzamenis Stefano. Ĉu li estas junulo aŭ maljunulo? Ĉu eble infano surmetis jakon de sia avo? Stefano hezitis. Ĉu aliri aŭ retiriĝi? Sur la vojo aŭdiĝis mallaŭtaj paŝoj de piedoj en mokasenoj. Li ekrigardis tiudirekten kaj vidis bele vestitajn geedzojn irantajn al vilaĝo Lesje. Li tuj rekonis la viron. Li estis Velimir la forĝisto. Stefano kuŝiĝis por ne esti vidata, sed bone vidi la vojon tra la arbustaro.

– Bonan matenon, onklo Miro! – diris Velimir.

– Dio donu bonon! – respondis la sidanto, en kiu rekonis Stefano la maljunan paŝtiston Miron.

– Ĉu vi bone fartas? – demandis Velimir.

– Bone, dank’ al dio, bonege; pli bone ol miaj gepatroj, ĉar mi ankoraŭ vidas la sunon, – ŝerceme respondis li kaj tuj demandis:

– Sed kien vi iras tiel frue?

– Al Izvor. Ni devas iom helpi al Živko, la frato de mia Milka. Ili patronfestas.

- Al Izvor! – diris Miro balancante la kapon, – Sed vi ne povos reveni ĝis la vespero.
- Ho, ne! Ni eĉ ne intencas reveni antaŭ tri tagoj. Ni tie dormos du noktojn.
- Kaj ĉu vi ne timas la prezigitan ŝteliston?
- Kiun? ... Ha! ... Ĉu Stefanon? Kial timi lin? Li ja ne estas rabisto survoja, sed nur kokejojn li atakas – ekridis Velimir.
- Ne ridu, Velimir, ne ridu! Vi lasis la domon sola.
- Ho, nia filino Smilja ne estas malgranda. Ŝi bone gardos la domon. – diris Velimir kaj daŭrigis la vojaĝon.

Stefano Ŝtelet eksentis malestimegon kontraŭ Velimir. Li sentis ofendon en lia rido. La timo malaperis kaj formiĝis naŭzo kontraŭ la tuta mondo. En la cerbo ekbolis diversaj pensoj kaj ekfunkciigis strangajn planojn. Li retiriĝis rampante, eksidis sur rosigitan herbon kaj ekkoncentrigis la pensojn. Naŭzo, malestimo kaj malamo ŝveligadis lian animon. Lia sango bolis, la oreloj zumis ritme kaj li eksentis varmon. Li jam ne tremis, sed kontraŭe li estis ekŝvitonta.

Li forviŝis la apenaŭ aperantajn ŝviterojn kaj ekstaris kun decida intenco venĝi. Li larĝe ĉirkaŭiris la maljunan paŝtiston kaj direktiĝis al la domo de la malamegata forĝisto. Dum la irado li kelkfoje haltis, kelkfoje ekkaŭris kaj kelkfoje eĉ kuŝiĝis por ne esti vidata. Fine li venis antaŭ la celatan domon. Li ekrigardis ĉirkaŭen kaj atenteghe aŭskultis la movadon en kaj ĉirkaŭ la domo. Smilja eliris el la domo portante en pelvo kelkajn maldikajn ĉemizojn. Ŝi aliris al la puto, surterigis la pelvon kaj ekĉerpis akvon.

– Do, ŝi devas lavi la tolaĵon – ekpensis Stefano – ŝi lavu kaj mi eniros en la domon.

Dirita – farita. Li pasis liberege tra la korto kaj eniris en la domon. Ĉiuj pordoj estis malfermitaj. Li unue ekrigardis la pankeston, malfermis ĝin kaj prenis iom da pano. Li ekmiregis, ke li ne povas multe manĝi. La krtatagberoj ja ege satigas. Manĝinte iom da pano li ekpromenis en la domo. Subite li ekaŭdis kanton de Smilja. Ŝi ankoraŭ ĉe la puto kantis. Stefano volis trovi bone kaŝigan lokon por resti tie ĝis la vespero. Li intencis forŝteli dum la nokto monon kaj malgrandajn valoregaĵojn. Tio estus pezega venĝo por la prirido de Velimir. Smilja kantante proksimiĝis al la domo. Stefano ekremis, sed la knabino kantante pendigadis la lavitajn ĉemizojn sur la ŝnuron streĉitan de la fenestro ĝis la morusarbo. Stefano rapide decidis. Li elektis la knabinan ĉambron. Smilja eniris la domon. Li enspiris profunde la aeron kaj atendis trankviligante la spiradon.

Fine Smilja transpaŝis la sojlon de la ĉambro kantetante. Stefano estis tute sekura en sia kaŝejo. Sed Smilja, kvazaŭ ekmemorinte ion,

eksilentis. Ŝi eksidis, pensante ion, sur la benkon apud la fenestroj kaj prenis sian rondan speguleton el la zono kaj rigardis sin. Stefano vidis ŝin bonege. Ŝi ne rigardis lin, sed daŭrigis observi sian vizaĝon en la speguleto faranta grimacojn laŭplaĉe. Ŝi ekridetis al la speguleto, rondigis la lipojn kvazaŭ kison. Poste ŝi palpebrumadis, rigardis antaŭ si honteme kaj ĉion ripetadis. Fine ŝi komencis paroli kun si mem daŭrigante fari grimacojn:

– Vere mi estas bela... Mi estas certa, ke mi estas la plej bela knabino en nia vilaĝo... Jes, certe. Tion ja diris al mi la fraŭloj. Kaj se ankaŭ la knabinoj ne diris tion al mi... tio estas nur pro ĵaluzo... Alie ankaŭ ili tion dirus... Sed estas ja vero, ke mi estas belega. Verŝajne mi estas la plej bela knabino el ĉiuj en nia ĉirkaŭaĵo. Jes... mi tion vidas tre bone en la speguleto. Jen kiel belaj estas miaj vangoj. Kiel blankaj rozoj! Se oni rigardas ilin, oni havas impreson, ke ili odoras je rozoj... Kaj la brovoj faras miajn okulojn ankoraŭ pli belaj... Sed la plej belaj estas miaj lipoj. Ruĝaj estas ili kiel maturaj ĉerizoj... Multaj fraŭloj svarmos ĉirkaŭ mia domo. Multaj deziras edziĝi kun mi... sed mi edziniĝos al fraŭlo el malproksima vilaĝo... Jes, trans naŭ vilaĝoj el la deka... Kaj venos multaj edziĝfestanoj en belegaj veturiloj. La bopatro ĵetados monon. Li ja estos riĉega kaj li ĵetados eĉ orajn monerojn... solenega estos mia edziĝfesto... kaj mi poste vivos feliĉe kun mia bonega kaj belega edzo.

Stefano aŭskultis de sub la lito kaj kun granda peno tenis sin serioza. La monologo de Smilja tiom ridigadis lin. Ŝi daŭrigis paroli libere, verŝajne certa, ke neniuj aŭskultas ŝin:

– Kaj mi naskos filon... li estos bela... belega... la plej bela bubo sub la suno... Kaj lia nomo estos Stojan. Jes, Stojan. Kaj mi venos gaste al la gepatroj kaj mi restos kelkajn tagojn en ĉi tiu ĉambro. Kaj Stojan rampos tra la ĉambro. Sed mi fermos la ĉambron...

Tiam ŝi aliris la pordon, ŝlisis ĝin kaj eltirinte la ŝlosilon alkroĉis ĝin al najlo inter la fenestroj. Super la fenestro, sur breto, estis longa ŝtona akrigilo por falĉiloj. Smilja ekkriis timigite:

– Ho, ve!... ĉi tiu akrigilo falos de la breto sur la kapon de Stojan kaj mortigos lin.

Tiam Smilja daŭrigis plori:

– Mi ne havos plu mian belegan filon. Mi ploros... Mi vekriados: Ho, ve! ... Stojan!... Hooo! Stoojaaaan! Ho, Veeee! Stoojaaaan! Ho ve al mi!... Hooo! ... Stoojaaaan!...

La kriado estis tiom forta ke eĉ Stefano ridetis sub la lito. Sed Smilja ne atentis lin. Stefano ne miris longe, ĉar al la fenestro aperis najbaro nomiĝanta Stojan, verŝajne altirita de la vekriado kaj kredanta, ke okazis iu malfeliĉo.

– Kial vi vekrias tiom? – demandis li, – Kio okazis?


Smilja tuj serioziĝis kaj respondis tute normale:

– Jen, estas viro sub mia lito. Mi vidis liajn krurojn kaj mi ne aŭdacis eliri kaj lasi lin sola en la domo. Mi petas vin, Stojan, kaptu kaj punu lin.

Ŝi dekroĉis la ŝlosilon, malŝlosis la pordon kaj Stojan eniris. Li eligis de sub la lito Stefanon kvazaŭ ŝtonigitan.

Estas facile imagi, kia ĝojo ekestis, kiam Smilja kaj Stojan dividis la „grasan premion“ por la ĉesigo de ĝenadoj en kokejoj.

Verkita de la 20-a ĝis la 23-a de decembro 1933 en Ďavato



Originala poezio

Dimitrije Janičić

MALPERMESU MILITON!

Panjo,
Kial grandaj nigraj birdoj ĵetas bombojn?

Panjo,
Ĉu nin deziras mortigadi iuj nekonataj homoj?

Panjo,
Ĉu denove okazos milito pri kiu rakontis la avo?

Panjo,
Unuigu ĉiujn amojn por siaj infanoj,
kolektu ĉiujn patrinajn zorgojn,
unuigu ĉiujn dezirojn por infana feliĉo
ĉar la panjoj naskis ĉiujn infanojn de la mondo!

Panjo,
Ĉiuj patrinoj de la mondo povas malpermesi militon!

ЗАБРАНИТЕ РАТ!

Мамице,
Зашто велике црне птице бацају бомбе?

Мамице,
Зар страни, непознати људи желе да нас убију?

Мамице,
Да ли ће поново бити рат о коме је деда причао?

Мамице,
Удружите све љубави за своју децу,
сакупите све мајчинске бриге,
удружите своје жеље за дечју срећу,
јер ви сте родиле сву светску децу.

Мамице,
све маме на свету могу да забране рат!

Jen la japana traduko de la poemo (tradukinto nekonata):

海外からのメッセージ

ディミトリー・ヤニチック (セルビア)

男性 ジャーナリスト ベオグラード市

私は、爆撃を受けながら書いた(1999年)私の詩をメッセージとして送ります。

戦争を 許さないで!

母さん、

どんな大きな黒い鳥が 爆弾を落としているの?

母さん、

誰か知らない人たちが 私たちを殺そうとしているの?

母さん、

おじいさんが話していた戦争が また始まったの?

母さん、

子どもたちへの愛を全部 ひとつにして

母さんたちみんなの願いを ひとつにして

私たちを幸せにしたいという願いを ひとつにして

だって 母さんたちが世界の子どもたちを 生んだのでしょ

母さん、

世界中の母さんみんなで 戦争を許さないで!

Tradukoј

Стојан Д. Николић

ЕСПЕРАНТО – ЈЕЗИК СВЕТА

Дарова нам, мили Боже,
лаган језик, вредан злата.
Није важна боја коже,
отвара нам свака врата.
Кад се људи једном сложе,
ми имамо свуда брата.
Увек корист, никад штета –
ЕСПЕРАНТО – ЈЕЗИК СВЕТА.

Зелена нас звезда зрачи,
нуди додир топле руке.
Матерњи нам много значи,
од предака, за унуке.
Светски језик још је јачи,
свуд по свету, без по муке.
По планети човек шета –
ЕСПЕРАНТО – ЈЕЗИК СВЕТА.

Запевајмо, заиграјмо,
прихватимо коло среће.
Себи сличне упознајмо,
радости су онда веће.
Што имамо другом дајмо,
нека буја наше цвеће.
Нико никог не омета –
ЕСПЕРАНТО – ЈЕЗИК СВЕТА.

Времена су каткад тешка,
пуна мржње, пуна злобе.
А на лицу нема смешка,
наслуте се непогоде.
Догоди се страшна грешка,
нема правде ни слободе.
Свака мржња нек је клета –
ЕСПЕРАНТО – ЈЕЗИК СВЕТА.

ЕСПЕРАНТО наду буди,
и видике пружа јасне.
Трајну вредност свету нуди,
жар пламена да не згасне.
Препуне су тесне груди
од лепоте дивне, красне.
Здраво семе, биљка цвета –
ЕСПЕРАНТО – ЈЕЗИК СВЕТА.

Увек корист, никад штета,
по планети човек шета.
Нико никог не омета,
свака мржња нек је клета.
Здраво семе, биљка цвета –
ЕСПЕРАНТО – ЈЕЗИК СВЕТА.

*Јагодина, јун 2006
Jagodina, junio 2006*

Stojan D. Nikolić

MONDOLINGVO ESPERANTA

Grandan dankon, Dio kara,
pro la lingva or-trezoro:
sur la tero tuthomara
ame plenas ĉiu koro.
Kiam homoj akordiĝas,
ili fratas kun fervoro.
Ĉiam ĉie utilanta –
MONDOLINGVO ESPERANTA.

Verda stelo jen radias,
nin karesas varmamane.
Patrinlingvo tradicias
por ni grava loke, klane.
Mondolingvo ekspansias
lernfacile, planedspane:
hom' planede promenanta –
MONDOLINGVO ESPERANTA.

Ni ekdancu, kantoj sonu,
ho, feliĉu, kamaradoj,
similulojn ni ekkonu,
pligrandiĝu la ĝojadoj.
Havojn niajn ni disdonu,
kresku floraj miriadoj.
Homo homon ne ĝenanta –

MONDOLINGVO ESPERANTA.

Tempo nuna iam duras,
amo mankas, bono senas.
La vizaĝoj hat-obskuras,
uraganoj, ŝtormoj venas.
Suferadojn, ja, aŭguras.
Liberecon abomenas.
Interamo estu sankta –
MONDOLINGVO ESPERANTA.

Esperanto – lingva oro:
horizontoj iĝas klaraj.
En la mondo ad-valoro,
ĝiaj flamoj brilas araj.
Abundegas homa koro
je belecoj senkomparaj.
Sana semo: floro planta –
MONDOLINGVO ESPERANTA.

Ĉiam ĉie utilanta,
hom' planede promenanta.
Homo homon ne ĝenanta,
interamo estu sankta.
Sana semo: floro planta –
MONDOLINGVO ESPERANTA.

Esperantigis *Živko Ivanović*



Iz zbirke „Srebrni krevet“

51.

Dođi u moj san, ljubavi moja
i neću znati da ti je srce ućutalo
Odeni odoru ljubavi i dođi u moj san
gde sve može biti kao nekad
kao što je već bilo
Dođi u moj san, odenuću te u tvoje lepo telo
okitiću te zdravljem zemaljskim
bićeš obasut nežnostima
Poseti moj san, ljubavi moja, uteši me.

53.

Žalim vodu koju pijem
breskvu koju jedem
vazduh koji udišem
jer mi daruju život.
Kako nisam umrla
kad su trojica
mladih policajaca
pokazavši slovima išaranu hartiju
rekli da si umrla
kćeri moja, lepoto moja.

58.

Imati moje ime, znači imati vas
i izgubiti vas, imati sebe
i ovo ime.
Osudila sam sebe na ove opustele odaje
a Bog me šalje na puteve po planeti
I gde god stignem, uvek sam to ja
s bremenom sećanja, sa vama.
Govorila sam dok sam peglala vašu odeću
dok sam pržila palačinke
da vas miomirisom dozovem iz sna
govorila sam vam koliko vas volim
da je ljubav moja beskrajna
da ništa ne postoji pod kapom nebeskom
što bi tu ljubav umanjilo.
Gordila sam se da je moj život
stvoren od Boga samo za vas
da ste sišli sa neba zbog mojih poljubaca
volim vas mada ste se vratili na nebo
mene okovali u patnju i bol.
Zazidana ćutim, ne hulim
otplaćujem dug za srećne dane
koje sam otela od neba.

El la kolekto „Arĝenta lito“

51.

Venu en sonĝon, amato,
ne scios mi ke kor' via silentas
Surmetu amveston por veni en sonĝon mian
kaj ĉio povas esti samkiel
iam estis.

Venu en sonĝon, surmetos mi vin belkorpon vian
ornamos vin per tera sano
superŝutos vin per karesoj
Vizitu sonĝon mian, amato, konsolu min.

53.

Priploras mi akvon trinkatan
frukton manĝatan
aeron enspiratan
ĉar vivon ili min donas.
Kiel ne mortis mi kiam
tri junaj policanoj
plenskribitan paperon montrante
diris, ke mortis vi
filino mia, belulino mia.

58.

Havi mian nomon estas havi vin
kaj perdi vin, havi min mem
kaj tiun-ĉi nomon.
Kondamnis mi min al tiuj vastaj ejoj,
sed Dio min sendas al vojoj tra l' planedo
kaj alvenante kien ajn, ĉiam mi la sama restas
kun ŝarĝoj de memoroj, kun vi
Diradis mi gladante vestaĵojn viajn
fritante krespojn por vi
per bonodoro alvokante vin el dormo.
Diradis mi, ke amegas mi vin
ke amo mia senfinas
ke nenio sub ĉielo ekzistas
kio ĉi amon malgrandigus.
Fieradis mi, ke vivon mian
nur por vi du Dio kreis
ke vi venis de sur ĉielo nur pro kisoj miaj
amas mi vin spite al reiro via ĉielen
Karcere mi silentas, ne blasfemas
pagadas mi la ŝuldon por la feliĉaj tagoj
kiujn mi forrabis al ĉielo

Tradukis Agnesa Eremija

*Eva Marija Stević, naskita Balaša, konata sub la artista nomo **Eva Ras** (ŝia edzo, konata reĝisoro, nomiĝis Radomir Stević – Ras) en tuta iama Jugoslavio kaj eĉ ekster ĝi. Tiu nigre vestita, sveltfigura, modesta, kvankam trioble talenta, virino aktoras ekde sia junaĝo. Post la dolora perdo de la edzo, kaj poste de la unika filino, ŝi trovas la vivocelon ankaŭ en pentrado kaj verkado. Ŝiaj prozaj verkoj estis plirfoje premiitaj, krome ŝi estas nomita ambasadoro de Petar Kočić okaze de la 130-a naskiĝdatreveno da le fama serba verkisto. Aperis nur unu verskolekto de Eva en dulingva, angla-serba, eldono sub la titolo „Arĝenta lito“. Ĉi tie estas tradukoj de tri kortuŝaj poemoj el tiu libro.*

La filo de l' bataliono

Sub Afrik-ĉieloj brulaj,
Meze de l' plej negra gento
Sole estis blankhaŭtulaj
La soldatoj de taĉmento.

Kaj en tiu regiono
La solsola blankulino
Estis ĉe l' bataliono
De l' major' kuiristino.

La majoro, vigla viro,
Ŝatis ŝin pro spertaj konoj
En la arto de l' kuirio
Kaj ... de l' homaj am-bezonoj...

Sed sekrete ankaŭ uzis
Ŝin la juna leŭtenanto,
Ĉar neniam ŝi rifuzis
Sian koron al petanto!

Kaj havante superfluon
Ofte da temperamento
Ŝi konsentis rendevuon
Ankaŭ al la ĉefserĝento!

Ĉar ŝi estis tre diskreta,
Ĉiu el l' amantoj kredis,
Ke dum rendevu' sekreta
Li tutsola ŝin posedis...

Tial, foje, kiam temis
Pri videbla gravedeco,
Kulpkonscie ĉiu tremis
Pro la timo de patreco...

Kaj ŝi lerte ekspluatis
Ruz-minace la fatalon,
Ĉar neniu multe ŝatis
Mokan ridon nek skandalon!

Efektive la majoro
Tuj aĉetis la silenton:
Li je ŝia solfavoro
Skribis sian testamenton!

Pagis similmaniere
Leŭtenanto la silenton
Promesante surpapere
Dum dek jaroj altan renton.

La malriĉa ĉefserĝento
Faris kion ŝi proponis:
Por ke daŭru la silento,
Li ... edziĝpromeson donis!

* * *

Multe ridis la soldatoj
Kiu konis la sekreton,
Ĉar ŝi naskis post monatoj
... Tute nigran negruleton!!



Дете гарнизона

Под афричким сунцем жарким,
Где црнаца чиста зона,
Белокожи беху само
Војници из гарнизона.

А у целом томе крају
Витких палми, црних села,
Куварица у мајора
Једина је бела жена.

Мајор, човек од искуства,
Рад' вештине у кувању
Вол'о ју је, а уједно
Љубавноме вежб'о знању.

Ал' потајно то је знање
И поручник користио;
Одбити га није могла,
Када би је замолио.

Ал' јој бујан темперамент
Још једнога љубавника
Налазио потајно у
Лицу четног наредника.

Јер дискретна беше јако,
Сваки јој је веровао,
Да је био он једини,
Који јој је припадао.

Зато, кад се указаше
На њој знаци материнства,
Сваки од њих стрепио је
Из бојазни од очинства.

А лукавом претњом она
Користит' је случај знала,
Јер сваки се од њих бој'о
Од подсмеха и скандала.

Уистину мајор часно
Ћутање је откупио;
У њезину корист сместа
Тестамент је саставио.

А на доста сличан начин
И поручник... шта је знао...
За година десет ренту
Под потписом обећао.


И сироти наредник је
Морао да плати цену;
Да би ћутњу откупио,
Узео ју је за жену...

* * *

Смејали су се војници
- Јер ту "тајну" сви су знали -
Када, након пар месеци,
Родио се црнац мали ...

Zemun, la 22-an de februaro 1934

Tradukis: Branko Rajšić



DIMÂNDAREA PÂRINTEASCĂ

Pârintească dimândare
Nâ springurâ cu foc mare,
Frats di mumâ shi di tatâ,
Noi Armânj di eta toată.

Di sum plocile di murminitsâ
Strigâ-a noshtri bunj pârintsâ:
“Blâstem mare s-aibâ n casâ
Cari di limba-a lui s-alasâ.

Cari sh-lasâ limb-a lui
S-lu-ardâ pira-a focului,
Sâ s-dirinâ jiu pri loc,
Sâ-lj si frigâ limba n foc.

El ân vatra-lj pârintească
Fumealja s-nu-sh hârisească
Di fumelj curunj s-nu bashe,
Nat ân leagân sâ nu nfashe.

Care di-a lui mumâ,
Shi di pârintească-lj numâ,
Fugâ-lj doar-â Domnului
Shi dultseania-a somnului!”

Aŭtoro: Konstantin T. Belemače (Maloviște, 1844 – Maloviște, 1932)



VOTO DE GEPATROJ

Gepatra voto nin ĵurigas
Per ardaĵo kaj fortigas,
La gefratojn familianojn,
Dum jarcentoj nin Aromanojn.

El sub tombplategoj pezaj
Admonas nin la gepatroj,
“Anatemon hejme havu
Se la lingvon vi ne savu.

Kiu lingvon sian lasus
Fajroflame li forbrulus,
Kaj en polvo turmentota
Kaj la lango bruligota.

Sur fajrujo de domanoj
Ne amuzu kun infanoj,
Geedzan kronon kisadi
Nek lulilon li vindadi.

Forkuranto de patrino,
De la nomo patra, kaj avino,
Restu li sen sav' Sinjora
Kaj sen dolĉa revo kora.

Tradukis Pribislav Marinković



МАРИЦЕ

Продавала се ливада Марице. Дошао сам, обишао је и сјео на пањ да одморим. Очарала ме љепотом, а изненадила ниском цијеном.

Упекло сунце. Пој цврчака. Дјетлић чекићари подбулу кору трешње, повремено застане да сачека црва. Мирис тек покошеног сијена сладуњава омамљује и вуче у сан.

Изненади шушањ. Змија! Вијуга у откосу. Извири, пушући осмотри, умири се, валовито одгмиза у други откос. Шушањ у оба откоса. Извирују двије главе. Мир?! Из првог завијуга блавор, изгуби се у другом откосу, змија одгмиза у трећи...

– Посматрате лов блавора на змију? – изненади нечујно пристигли косац, који је дошао да провјери сувоћу сијена.

– Да, да, гледам. Хоће ли је ухватити?

– Хоће! – одговори.

– Изгледа, овдје има доста змија!? – допитах.

– Пуне Марице – каза, па нагласи: – Овдје им је легло.

– Ливада се дуго продаје? Не оре се. Изгледа плодна земља. Необично је што нема купаца? – казах.

– Сељаци су мрзјели Марицу, па и ливаду чије име носи – објасни.

– Ко је била Марица? – упитах

У стара времена, у доба Стјепана, на овом брду живио је сиромашан старац. Надалеко се прочуо по мудрости. Стјепан бијаше строг владар, и није трпио мудраце. Изузетно, једино поштивао је тога старца и обраћао му се у неприликама.

Кад се господар ожени лијепом Млечанком, Марицом, узе и европејску титулу херцег, поста још злочестији, одбаци и оно мало пријатеља, па и старца. Латинка би мудрија. Она је полако удијевала своје конце и на свој начин почела да влада. Разјуривала је дворјане, а доводила своје. Чак је довела и послугу – десет кршних Арапкиња. Разјурени је оговараху по земљи, пришише јој да је и невјерна љуба. Дочу и Херцег, нагризе га црв сумње. Почео је да је уходи, али није имао с ким – остао је без вјерних.

Али се сјети и посјети старца који је тада живио са шеснаестогодишњом кћерком. Справили су вечеру. Мимо очекивања, старац је увео нагу јединицу и наредио да таква послужије.

– Старче, мудар си, кажи шта мислиш о господарици Марици?
– изненада, у току вечере, отпочеће Херцег.

– Не живим на двору! – као да сиромаша није изненадило питање.

– Говоре да ми је љуба невјерна!? – владар није околишао.

– У лажи су кратке ноге! – након краће ћутње узврати старац.

– Ко лаже? – иако мудар владар, ипак Херцег није био сигуран да зна шта мудрац хоће да каже.

– Чуће се! – старац није канио да буде отворенији.

– Када? – Стјепан је хтио из старца да извуче бар нешто.

– Дуго живе мале лажи, велике кратко! – старац је остајао на нивоу мудрих.

– Колико је велика лаж око моје Марице? – није могла да не проговори љубомора мужа.

– Дан! – старац је изненадио и одговором и брзином.

– Толико велика? – готово да се заплашио господар.

– Дан! – потврдио је мудрац.

– Сматрај се позваним у дворе на сутрашњу вечеру. Буде ли до тада утврђена истина, вратиће те позлаћени дворски коњи; у противном – појефтиниће ти кожа – строго рече велики гост, подиже се и оде.

– Сиромашном старцу позив на вечеру код силног Херцег Стјепана чини велику част. Прилику нећу пропустити – промуца домаћин испраћајући госта.

– Дворила ме нага јединица... Узвратите част! – захтијевао је домаћин од дворјана, саопштавајући о старчевој посјети.

И старац је дочекан на двору као ико и икад.

Сједио је изнад домаћина. Дворила је послуга господарице – десет младих Арапкиња. Уз богату трпезу и благ разговор вријеме је протичало. Сви су вјеровали у нешто, Херцег засигурно. Двором је завладао мир, сатворио се мук. Херцег ће почети:

– Синоћ си ме угостио прелијепо. Дар се уздарју нада. Трудио сам се да узвратим. Чинила је то и моја љуба, једини си којему је поклонила и осмијех свих десет Арапкиња – каза владар, заћута, па одлучно запита:

– Јесам ли вратио зајам?

– Указана ми је почаст које нисам вриједан. Хвала господарима – каза старац, па настави веома тихо: – Ипак, нека ми не буде замјерено, ја имам дјевојку, кћерку-јединицу, скидох је пред тобом, а ти... десет Арапкиња, не скиде ни једну!?

– Нека се свуку све Арапкиње! – строго нареди Стјепан.

– Не! То је моја послуга – успротиви се господарица.

– Свуците их! – владар подврисну на чуваре.

Поцијепаше бројне хаљине.

Умјесто нагих дјевојака, указа се десет кршних момака.

На овој ливади, са два коња, Херцег Стјепан рашчеречи невјерну жену – Марицу.

Не сахрани је. Остави је псима...

Danilo Marić

MARICE

Oni vendadas herbejon Marice. Mi alvenis, vizitis ĝin kaj eksidis sur la ŝtipon por ripozi. Ĝi ravis min per sia beleco kaj surprizis min pro malalta prezo.

Ekardis la suno. Kanto de griloj. Pego martelas la ŝvelantan ĉerizujan ŝelon, de tempo al tempo haltas atendente vermon. Odoro de ĵus falĉita fojno dolĉece svenigas kaj dormigas.

Subite – susurado. Serpento! Zigzagas en falĉaĵo. Ĝi gapas, siblante ekobservas, trankviliĝas kaj forglitas en la alian falĉaĵon. Susurado en ambaŭ falĉaĵoj. Du kapoj ekaperas. Kvieto?! El la unua falĉaĵo elrampis blavoro¹, malaperis en la duan falĉaĵon kaj la serpento forglitas en la trian...

– Vi observas kiel blavoro ĉasas serpenton? – surprizis min neaŭdeble alveninta falĉisto kiu venis kontroli la sekecon de la fojno.

– Jes, jes, mi rigardas. Ĉu ĝi kaptos la serpenton?

– Ĝi sukcesos! – respondis la falĉisto.

– Ŝajnas ke ĉi tie ekzistas multaj serpentoj? – mi aldemandis.

– Marice plenas de ili! – diris li kaj akcentis: – Ĉi tie estas ilia kuŝejo.

– Ĉu tiun ĉi herbejon oni jam de longe vendadas? Oni ne plugas ĝin. La grundo ŝajnas fekunda. Neordinare estas ke mankas aĉetantoj! – diris mi.

– Vilaĝanoj malŝatis Marica-n kaj ankaŭ la herbejon kiu portas tiun nomon – klarigis la falĉisto.

– Kiu estis Marica? – demandis mi.

¹ Blavoro (vorto ne ekzistas en oficiala Esperanto) estas senpieda lacerto (latina nomo: Ophisaurus apodus) simila al serpento longa ĝis 1,4 metrojn. Ĝi vivas sur Balkana duoninsulo kaj ne ĉasas serpentojn, sed la aŭtoro de la rakonto tiel priskribis ĝin.

En fora tempo, dum la periodo de Stefano, sur ĉi tiu monto vivis malriĉa oldulo. Ĉien disaŭdiĝis lia saĝo. Stefano estis severa reganto kaj ne toleris saĝulojn. Escepte, li estimis nur tiun oldulon kaj turnis sin al li, kiam estis embarasoj.

Kiam la reganto edzinigis la belan venecianinon, Marica-n, li prenis ankaŭ eŭropan titolon – Duko fariĝis eĉ pli malbona, rifuzis eĉ tiujn malmultajn amikojn kaj ankaŭ la oldulon. La veneciano estis pli saĝa. Ŝi malrapide iom post iom enigadis siajn fadenojn kaj propramaniere komencis regi. Ŝi dispeladis la gekorteganojn kaj alvenigadis siajn ulojn. Ŝi eĉ alvenigis ankaŭ servistinojn – dek altkreskajn arabinojn. La dispelitaj klaĉadis kontraŭ ŝi tra la ŝtato, kalumniante ŝin kiel malfidelan edzinon. La Duko aŭdis tion, vermo de suspekto ekmurdis lin. Li komencis spioni ŝin, sed li restis sen fidelaj servistoj.

Tiam li rememoris kaj vizitis la saĝan oldulon, kiu en tiu periodo loĝis kun deksejara filino. La oldulo kaj lia filino preparis vespermanĝon. Neatendite, la oldulo enkondukis la solfilinon nudan ordonante ke ŝi tia servu la Dukon.

– Oldulo, vi estas saĝa, diru kion vi opinias pri la mastrino Marica – subite, dum la vespermanĝo, komencis Duko.

– Mi ne vivas en la kastelo – la malriĉulon kvazaŭ ne surprizis la demando.

– Oni parolas ke mia edzino ne estas fidela? – la reganto rekte diris.

– Mensogo malproksimen ne kondukas! – post mallonga silento replikis la oldulo.

– Kiu mensogas? – kvankam saĝa reganto, tamen Duko ne estis certa ke li komprenas kion la saĝulo intencas diri.

– Oni aŭdos! – la oldulo ne intencis esti pli klara.

– Kiam? – Stefano volis ekscii de la oldulo almenaŭ ion.

– Longe daŭras malgrandaj mensogoj, la grandaj tre mallonge! – La oldulo restis je l' nivelo de la saĝaj.

– Kiom granda estas la mensogo pri mia Marica? – ne povis prisilenti la edza ĵaluzo.

– Unu tagon! – respondis la oldulo subite kaj rapide.

– Tiel granda? – preskaŭ ektimis la reganto.

– Unu tagon! – jesis la saĝulo.

– Konsideru vin invitita al morgaŭa vespermanĝo en la kastelon! – Se ĝis tiam estos konstatita la vero, vin revenigos la orumitaj kortegaj ĉevaloj; en kontraŭa kazo via haŭto malpli valoros! – severe diris la altranga gasto, ekstaris kaj foriris.

– Inviti malriĉan oldulon por vespermanĝo ĉe la potenca duko Stefano estas granda honoro. La okazon mi ne preterlasos – balbutis la dommastro akompanante la gaston.

– Min servis la nuda solfilino... Reciproku honoron! – postulis la dommastro de korteganoj, sciigante ilin pri la vizito de la oldulo. Kaj la oldulo estis gastigita en la kastelo kiel neniu alia iam ajn.

Li sidis en honora loko, supre de la domastro. Lin servis servistaro de la mastrino – dek junaj arabinoj. Ĉe riĉa manĝotablo kaj agrabla interparolado, la tempo rapide pasis. Ĉiuj esperis ion, Duko certe. En la kastelo regis paco, fariĝis silento. Duko komencis:

– Hieraŭ vespere vi gastigis min bonege. Donaco atendas reciprokon. Mi klopodis reciproki. Tion faris ankaŭ mia edzino, vi estas la sola al kiu ŝi donacis rideton de ĉiuj dek arabinoj – diris la reganto, eksilentis kaj poste decideme demandis:

– Ĉu mi redonis la pruntaĵon?

– Al mi estas farita honoro kiun mi ne indas. Dankon al la gemastroj – diris la oldulo, kaj daŭrigis tre mallaŭte: – Tamen, ne riproĉu min, mi havas fraŭlinon, solfilinon kaj mi nudigis ŝin antaŭ vi, kaj vi... de dek arabinoj neniun senvestigis!?

– Senvestiĝu ĉiuj arabinoj! – severe ordonis Stefano.

– Ne! Tio estas mia servistaro! – kontraŭstaris la mastrino.

– Senvestigu ilin! – akre ekkriis la reganto al siaj gardistoj.


Ili disŝiris multnombrajn robojn.

Anstataŭ la nudaj fraŭlinoj – aperis dek altkreskaj fraŭloj.

Sur ĉi tiu herbejo, pere de du ĉevaloj, Duko Stefano diskvaronigis la perfidan edzinon - Marica.

Li ne entombigis ŝin. Li forlasis ŝin al hundoj...

Tradukis Dimitrije Janičić



DANILO MARIĆ naskiĝis la 26-an de aŭgusto 1938 en Kosor, vilaĝo 12 kilometrojn for de Mostar, ĉefurbo de Hercegovino en Ŝtato Bosnio kaj Hercegovino, tiam en Jugoslavio. Li estas inĝeniero kaj magistro de teknikaj sciencoj. Antaŭ sia emeritiĝo li laboris 40 jarojn, 35 en Mostar kaj 5 en Los Angeles. Li forlasis la hejmlandon la 3-an de aprilo 1992 pro milita tempesto kaj post tri jaroj de migrado li haltis en Los Angeles.

Li verkis naŭ romanojn, naŭdekon da rakontoj, tri teatrajn dramojn kaj tri fakajn librojn.

Simo Matavulj (1852-1908)

BAKONJA FRAT'-BRNE (Bakonja fra-Brne)

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(tria parto)

Li ne estas tute malbona, sed li estas saĝa, mia frat'-Brne, je mia Virgulino, pli saĝa en multaj aferoj ol la paĉjo...

-Ti-i-el!

Pli forta tusado inter Jerkoviĉoj.

-Pli saĝa ol la paĉjo kaj aliaj, kredo al mi, frat'-Brne! Jen venis hieraŭ Lika-anoj por aĉeti vinon. Jere postulas dekunu florencojn por unu sitelo, kaj ili ofertas naŭ. Tiel daŭris dum la tuta mateno. Fine Jere volis doni, sed Korpulentulo diris al li: "Ne donu, paĉjo, ĉar mi kaŝaliris kiam ili interparolis, kaj aŭdis ilin paroli ke vino en aliaj vilaĝoj estas pli multekosta ol la nia, sed malpli forta ol la nia. Ankoraŭ ili diris ke en la nian oni povus enverŝi trionan parton da akvo!"

-Ti-i-e-el, ti-i-el, tiel! Nu, ĉi tien, venu ĉi tien, venu, venu, venu! – diris la pastro.

Korpulentulo kisis la manon de la pastro.

-Kaj kion vi pensas, he? Ĉu vi friponados, se mi kunirigos vin en la monakejon, he?

-Mi obeos vin kaj estos bona! – respondis Korpulentulo malkaŝe rigardante la onklon al la okuloj.

-Ne parolu tiel, kruda infano, sed diru: Mi obeos vin, honesta patro, kaj estos al via boneco obeega! – korektis Stefano.

-Mi obeos vin, honesta patro, kaj estos al via boneco obeega! – ripetis Korpulentulo kaj rekisis la manon de la onklo.

-Tiel, mia bela Stefano, - diris Vespulino – estu tostegema, kaj, je via feliĉo, instrukciu la nekleran knabon, ĉar ni similas kvazaŭ al bovoj... (laŭ la Plena V. povas esti ankaŭ akuzativo).

-Ti-i-el! Sufiĉas nun! – interrompis la pastro – la knabo saĝiĝos, mi esperas, sed se li ne saĝiĝos, jen mi reen kun li! Sed nun sufiĉe kaj sufiĉege!

Vi, Barica, preparu al li iom da kanabteksaĵoj kaj alion viascie, kaj li kuniru min morgaŭ. –Ti-i-el! Sed vi, etulo, senŝuigu min!

Vespulino aliregis kaj forkisis ambaŭ manojn de la bofrato. Post ŝi aliris Hirtulo. Ambaŭ larmplenigis la okulojn. Ŝi turnis sin al la servisto kaj volis ankaŭ lian manon kisi.

-Tii-el! Sufiĉas, sufiĉas! – diris Brne. –Estas tempo enlitiĝi!

Poste li leviĝis kaj kliniĝis al Stefano. Stefano kaptis la sutanŝultrojn kaj fortiris al si, tiel ke la pastro restis nur en la pantalono, veŝto kaj braknuda. Tia li ŝajnis multe pli dika kaj kvazaŭ iu alia persono.

Hokstango, Nazsonulo kaj Ronkulo flustris ion vigle inter si. Hokstango direktis la montrofringron al sia frunto kaj frapetis ĝin.

Vespulino diris al la infanoj:

-Nu, kisu la manon de la onklo kaj diru: Dankon, nia bela pastreto!

Kadukulo, kurbulino kaj Vitriolo faris tiel, dum la patrino levis Ventregulon kaj li ankaŭ kisetis la onkleton.

-Tii-el! Enlitiĝu ja! Iru ankaŭ vi, fraĉoj!

-Mi petus por unu vorto! – komencis Hokstango, depreninte la ĉapon kaj proksimiĝinte al la fajrejo. Ĉiuj Jerkoviĉoj ariĝis post lin.

-Kion ja, Jure? – demandis neglekte la pastreto gratante siajn krurojn.

-Mi petus, sed pardonu kiel pli maljuna kaj pli saĝa. Jen tion. Ni... tiel... mi diru... ni jen deziras malbonon al neniuj, precipe al nia sango, al nia frato, sed... sed...

-Nu, fraĉjo Jure, iru hejmen, Dio vin vivigu! Iru ĉiuj, eĉ cetere estas jam malfrue! – interrompis lin Vespulino, pala kiel ĉifono.

-Sed... mi devas diri ke ni ne estas konsentaj...

-Pri kio ja konsentaj, pri kio konsentaj, lepro ebria? – interrompis lin Hirtulo ekkaptinte la fajroŝovelilon.

Sed inter ilin stariĝis Nazsonulo kaj nazsusuris altlevinte la manon:

-Neniuj! Ĉi tie ne helpas timigi! Ni ankaŭ povas disrompi ies ripojn. Nu certe! alvundadara!!!

-Kion? – ekkriis la pastro surprizite. Ke vi interbatiĝu?! Antaŭ mi?! Ti-ii-el!? Kaj kial?!

-Antaŭ ĉio, diru al ĉi-azenaĉo ke li ne ekbrusku, ĉar se ĉiu perfingre lin pikos, ne restos eĉ pecero de li! diras Hokstango.

-Ti-i-el!

-Kaj la via estos same konsiderata kiel ĉiam, pastreto, nur estas bone ke vi aŭdu nin!

-Ti-i-el!

-Kion ja faros al li vorto? Kial li koleras, se lia animo estas trankvila? – diris Traserĉulo.

-Ti-i-el!

-Kaj plej grave estas ke li retenu al si la manojn kaj langon aldente, li kaj Vespulino, ĉar... Ronkulo grincigis la dentojn.

-Ti-i-el!

-Se li ree atakos, ke mi frapegu lian kapaĉon, Murmurulido, bubo! – diras Nazsonulo.

-Ho Jesuo! Jesuo! – sopirĝemis la pastreto kaj, falsidiĝinte sur la seĝon, levis la brovojn, okulrulante de unu al la alia. Stefano stariĝis post lin, dum Hirtulo kaj Korpulentulo apogis sin kontraŭ la liton.

-Ĉu mi estas inter la fratoj aŭ inter hajdukoj ĉi-nokte? – komencis la pastro.

-Mia bona frat'-Brne, mi petegas, aŭdu min! – komencis milde Holstango. Ĉu mi diris ion malbonan? Ĉu mi eĉ pensis ion malbonan? Kaj li min pelas el la domo ĉi-maniere! Ni estas en lia domo, sed ni por vi

kunvenis, kaj mi havas diri al vi ion nome de ĉiuj, ĉar ni havas interkonsenton.

-Tii-el! – diris Brne, reveninte iomete al si mem.

-Tiel estas! Tiel! – ekbruegis ĉiuj.

-Do, jen kio estas. Mi ĵus diris ke ni ne havas malbonpenson pri nia sango, ĉar en la sango estas favorec' kaj fortec', kaj krome diamem'...

-Ne faru tiel, kiel ĵus antaŭe, sed diru mallonge kaj klare kion vi havas! – diris frat'-Brne.

Nazonulo ekpuŝis la fraton, kaj stariĝis sur lian lokon:

-Mallonga estas tio ĉi: Ni ne volas ke vi konduku Korpulentulon en la monakejon!

-Tii-el? Vi ne volas? Kaj kiu ordonas al mi?

Manlamulo forpuŝis Nazsonulon kaj stariĝis sur lian lokon:

-Ni ne ordonas al vi, nek ni tion povas, sed, je Kristisango (kaj ĝi estas multekostega), vi pentos, se vi kondukos lin, ĉar tiu knabo hontigos vin kaj nin ĉiujn!

-Tii-el! Sed mi revenigos lin, se li ne taŭgos por tio.

-Estas eĉ malbone ke li kuniru! – diris Nazkataro.

-Ĝis kiam vi lin ekkonos, li povos fari ion jam nekorekteblan! – diris Traserĉulo.

-Nu ĉio ĉi estas senenhavaj vortoj, kaj mi ne scias kion vi deziras finfine?

La arda Ronkulo dentgrincis, forpuŝis ĉiujn, kaj ekpavis antaŭ la pastro:

-Jen mi diru al vi nedeturne, plej mallonge kaj klare. Vi elektis la filon de Hirtulo por ke li lernu libron, kaj fariĝu pastro. Vi eĉ tri vortojn ne diris al ni ĉi-vespere, sed lasis nin vidi vian elekton! Bele! Sed vi aŭdu la veron, poste faru kion vi scipovas. Kaj la vero estas jena: En Zvrljevo ne ekzistis ĝis nun tia fripono, dombruliganto, kverelemulo, nek alia diabla kreaĵo, kia estos ĉi-Korpulentulo. Li absolute similas al la mortinta onklo Jure, ĝuste, kaj malbonfinos same kiel li...

Hirtulo ekĝemis kiel vundita virbovo. Vespulino kaj Korpulentulo estis plorantaj.

La senindulga Ronkulo daŭrigis:

-Ĉion ĉi vi sciis, sed ne kredas al ni, sed vi inkliniĝis al via Hirtulo.

-Mi ne sciis tion!

-Jes, jes! La pasintan aŭtunon mi diris al vi ĉion detale. Same diris al vi kaj Hokstango, kaj Nazsonulo, kaj Manlamulo, kaj Nazkataro, kaj mi, kaj tion ankaŭ diros al vi la tuta vilaĝo, ĉar la tuta vilaĝo suferas pro li! Vidu kiel li nun ploras apud la patrino, kiel li ŝajnigas sin ĉasta! Kompatinda! Kaj li hepaton al vi forkaptus kontraŭ florenero. Jen lia patrino rakontas kiel saĝa li estas, kiel li kaŝaliris por aŭskulti kion la Lika-anoj parolis, sed ŝi ne diremas ke li forŝtelis el iliaj veturiloj du ŝinkojn kaj oni kune formanĝis ilin.

-Vi mensogas – diris Vespulino plorante.

-Silentu, virino, silentu, mi ne havas tempon, sed povus laŭvicigi belajn aferojn... Do, vi komprenis ĉion, kaj poste konduku lin! Pri lia

naturu aŭdos viaj samuloj pastroj, kaj eĉ al s-a Frane ne estos facile, ĉar tiu ĉi kaptprenos de li, se estos povinta, eĉ havonte rajton!

-Sufiĉe, pekulo, sufiĉe! – interrompis lin la pastro, pli kompatinde ol severe.

Sed Ronkulo ekflamis pro tio kaj allumbiginte la manojn, diris:

-Kiu estas pli granda pekulo, mi aŭ tiu kiu protektas tiajn ĉi friponojn, kiuj pastras?...

Tiam Stefano kolerkrevis kaj ekkriis:

-Malantaŭen, vi, Ronkulo, kiel ajn oni vin nomu, ĉar mi vian cerbon fluigos! – kaj li eketendis la manon al armilo.

Korpulentulo tuj stariĝis apud Stefano, kaj Hirtulo rekaptis la fajrostangon. Vespulino eklamentis. La pastro rigidiĝis surseĝe.

-Reen! – ekkriis ĉiuj tri.

Ronkulo malŝate alrigardis Stefanon:

-Kial ja vi enplektiĝas, vi vagemulo, pastra manĝflatemulo, pastra seksperanto kaj flatemulo, ha?! Sciu ke mi forprenos tiujn viajn fusiletojn de la zono kaj rompos ilin je vi mem!...

-Provu! diris Stefano eltirante la pistolon.

La pastro estingis la kandelon.

Oni aŭdis kiel eklakis ĉano de la pistolo.

Brne helpvokadis.

-Jere!... Jure!... Bare!... Ŝime!! Ĉu vi estas miaj fratoj? Je l' sufero de Jesuo Kristo, je l' s'a Frane, ne permesu ke la sango estu verŝata... Ve al mi! Ve al mi! hu-u! ho!... Stefano, Stefano, ne faru, bubo!...

-Ne timu, pastro, nenio okazos, - diris Manlamulo blovinstigante stipardaĵon.

-Ni ne timas tiujn transriverulojn, tiujn armitajn bravulojn! – diris Nazsonulo.

Brne komencis ĉirkaŭbraki Stefanon kaj, alanguliginte lin, turnis sin al Jerkoviĉoj:

-Je nomo de Dio, kion vi volas de mi?

-Ni deziras ke vi elektu la plej dignan el niaj knaboj! diris Ronkulo. Cetera ni konas la vojon al episkopo kaj al reĝo!

-Mi ja ne diris, ke mi ne volas! respondis la pastro iom pli trankvile.

Jerkoviĉoj komencis dorspuŝi Ronkulon, ĉiuj ektumultis:

-Nu, bele!... Ne povas esti pli bele!... Nu, bone... Kiel saĝa homo!... nia bona frat'-Brne!...

Tiam Hokstango reiris al sia antaŭa loko, kaj mielece:

-Kaj kial ĉi tio devis okazi? Kial vi lasis paroli ne min, sed tiun frenezan Ronkulon: bat'! frap'! pel'! puŝ'! kiel se oni ne povus homece...

-Bone, bone! Iru nun!

-Ho, mia bona, mia bela frat'-Brne! – daŭrigis Hokstango – ne pensu vi ke ni perdis la respekton al vi, kaj ke mi ne sciis ke vi faros juste! – diris li kaj kisis lian manon.

Ĉiuj ceteraj laŭvice aliris lian manon, ĵuregante ĉiu ke li "ne perdis respekton" al li, kaj petante pardonon. Iuj ankaŭ ekkriis:

-Bonan nokton, fraĉjo Ronkulo, pardonu kaj dankon pro la regalo!

Ronkulo eĉ ekploris dum la foriro:
 -Mi tute ne pensis ofendi vin!
 -Iru, fartu bone, iru! diris la pastro kaj, penirinte al la lito, etendiĝis, sopirĝeminte – kvazaŭ li estus depreninta de si centfuntan ŝarĝon.
 -Tii-ii-el! Hu! Diablo forigu vin ĉiujn, ĉiujn, ĉiujn kiomaj vi estas!...
 -Ho, malbenitaj antikristoj! ŝtelistoj! friponoj! spionoj! hajdukoj! dio vin mortigu! Vi ja pagos, pagos, se Jere estos viva – parolis Hirtulo.
 -Jen, mia bona bofrato! Jen kiaj ili estas, vi mem vidas, kaj ankoraŭ kredis al ili! – plorantis Vespulino.
 -Diablen ĉiuj! ĉiuj! ĉiuj! Hu! ĝemis senĉese la pastro.
 Dumtagiĝe, laŭ la ordono de la pastro, Stefano selumis la ĉevalon kaj ili ekiris.
 Hirtulo, helpinte la fraton surĉevaliĝi, ekstaris antaŭ la ĉevalo gratetante sin.
 La pastro, pala, kvazaŭ estinte malsana, rigardas la botpintojn kaj diras:
 -Nu... tiel ... ni vidos!... Tiam post Kristnasko-festo!
 -Mi... ja... kiel ajn vi diras! – diris Hirtulo.
 La pastro eĉ pli profunde enpenisiĝis kaj fine li decide diris:
 -Kuniru li ĝuste tuj! Kuniru li!... Kuniru li ĝuste tuj! – li ekspronis la ĉevalon kaj ekrajdis.
 Hirtulo kaj Vespulino brakumegis Korpulentulon, rekomendante al li obei la onklon Brne, rimarki kiel Jerkoviĉoj ŝatas lin, kaj ĝuste pro tio spite al ili pliboniĝi...
 Stefano kaj Korpulentulo ekiris.
 La geedzoj estis starantaj enkorpe ĝis kiam ili vidperdiĝis, kaj poste reeniris la domon.

IV ENKONDUKO EN NOVAN VIVON

Korpulentulo kaj Stefano iris kiom eble pli bone, sed malantaŭis post la bona pastro-ĉevalo. Hirtulido, malgraŭ la kurado, ne lasadis la serviston respiri, sed demandadis lin pri tio kaj alio: kiu vilaĝo estas tio, kien kondukas la vojo, de kie fluas la rivero, kaj tiel plu. Kiun ajn ili renkontadis, ĉiu salutis la pastron kaj ĉiu demandis Stefanon kie estis la pastro kaj kies estas la knabo. Korpulentulo miris kiel tiom da homoj konis la onklon, kvankam ili multe malproksimiĝis de Zvrlevo! Kiam ili estis transirontaj la ŝoseon en iu valo, al ili flugkuris du ĉevaloj, jungitaj je sinjoreca veturilo. La pastro ilin ĝisatendis, kaj la veturilo haltis apud li. Sur la antaŭa loko sidis viro kun fezo surkape, kiu belsalutis: "Laŭdata Kristo!". Malantaŭ li, sub la ĉarkovrilo, estis sternkuŝanta duopo kiam Korpulentulo neniam eĉ sonĝe vidis (ĉar Korpulentulo neniam estis en urbo). Dekstre estis maljunulo kun la griza barbo, kaj sur lia kapo ia ĉapo, kiel grandega fungo. Maldekstre vireto, maldika, kaduka, kaj sur lia hokforma nazo – vitrofenestretoj. Ambaŭ ili ekbabilis svingante la manojn, dum, post kelka tempo, la maljunulaĉo eltiris skatolon kaj

prezentis ĝin al la onklo, kiu prenis el ĝi inter du fingroj nigran cindron, spire ennazigis ĝin kaj ternis. Stefano havis penon por al la knabo ĉion klarigi.

-Tiajn vestojn kaj ĉapojn portas ĉiuj sinjoroj en urboj. Tiujn vitrofenestretojn portas la viroj ne bone vidantaj. Kaj tiun cindron oni enspiradas por plifortigi la vidon. Tiu lingvo, kiun li aŭskultis, nomiĝas itala kaj ĝin parolas ĉiuj kleraj homoj. "P'rke" signifas: kial; "ŝi" signifas: jes; "ĵe" signifas: estas, ktp.

La suno estis suprenirinta tri lanclongojn, kiam ili atingis riveron. Stefano kaj veturigistoj grandpene enirigis la ĉevalon je la floso, ĉar ĝi estis rektiĝanta kaj ĵetsvinganta la malantaŭajn piedojn.

-Kio diable okazas al ĝi ĉi-matene?" – diris frat'-Brne.

Finfine, la remiloj ekfunkciis kaj la ŝipo debordiĝis. Stefano ekstaris meze de ĝi, tenante per unu mano la ĉevalon, dum per la alia li ŝirmis la okulojn kontraŭ la suno. La pastro restis surborde, ĉirkaŭis la buŝon per ambaŭ manoj, kaj alkriadis:

-“Mal-rapide! malrapi-deee! Atentu ke ĝi ne ektimuuu! Atentu ke ĝi ne rompu la piedojn dum la elirooo!...

Korpulentulo estis staranta malantaŭ la pastro. Li aŭskultadis multajn, multajn rakontadojn pri ĉio, kio nun estis antaŭ liaj okuloj, ĉio estas plejparte alia ol li ĝin imagis! Jen la akvo bolbruegas kvazaŭ en mil potoj bolus brasiko. De kie ja devenas tioma akvo!? En Zvrljevo ekzistas nur pluvputoj, kaj se ili dumsomere senakviĝas, oni devas piediri malproksimen, al iu fonteto, kaj ankaŭ tie oni rompadas la kapojn, ĉar fariĝas interpuŝado kaj ĉiu emas pli rapide kapti ĝin. Kaj ĉi tie povus trinkadi la tutmonda vivantaro, kaj la tuta brutaro kiun homoj bredas, kaj ĉiuj sovaĝbestoj, kaj ĉiuj birdoj, tamen ili ne fortrinkus tiom rimarkeble!... Kaj kiaj estas tiuj birdoj flugantaj tien kaj reen superakve? Tiaj ne ekzistas en Zvrljevo! Ili estas pli grandaj ol kolomboj, kaj kun akraj kaj longajflugiloj. Nun, jen! jen! jen! unu alflugas en akvon, kaj elportas ion baraktantan en sia beko! Ĝi elportas fiŝon! Jen ankaŭ aliaj bekpikas kaj ĉasas fiŝojn! Birdoj ĉasas fiŝojn! Nu, ĉio ajn okazadas en monakejaj akvoj!!... Nun Korpulentulo ekdeziris enakviĝi, kaj sekiĝi en “aero”, kaj poste ree frap’! kaj tiel senĉese ĝis kiam kaptis lin tremeto pro tiu ekpenso... Poste li ekrememoris pri aŭskultado ke tiu rivero forfluas en maron, kaj ke la maro estas vasta kiel ĉielo. Li ekrigardis laŭflue de la rivero kiom eble plej malproksimen, ĝis kiam li rimarkis ĝin ŝnurmallarĝa kaj kaŝiĝanta inter montojn. Poste li deturnis la okulojn al insuleto sur kiu situas la monakejo. Jen, akvo ĉirkaŭis la grundon, poste du riverbranĉoj kuniĝas farante larĝon. Unu strio de l' disfluo estis blua, kaj la alia verdeta. Korpulentulo ekbedaŭris, ekpensinte ke akvo erigas la grundon, tiun belan humon kiu kliniĝis kvazaŭ fuĝante de sia malamiko. Je ĝia rando densiĝis salikoj, pro kiuj li vidas nenion pli ol ree verdajn densaĵojn kaj supre de ili feran krucon je la sonorilejo. Korpulentulo leviĝis je siaj fingroj kaj tiumomente ĵetfrapis liajn okulojn la forta lumo el la monakejo. (Je la preĝeja fenestro estis vitro reflektanta sunradiojn). Dio scias kion li

ekpensis pri ĝi, kaj li komencis ree leviĝadi je fingroj, kiam io ekblekis de tie: gaaa-gaaa...

-Kio estas tio? ekkriis Korpulentulo.

Lia onklo ektimis pro tiu krio, kaj, turninte sin, vangofrapis lin.

-Azeno de azenoj! Tiel vi timigis min, ha?... Nu, kial diablo ne foririgis vin kun ili en la floson, sed ankaŭ vi atendas ŝipon, kiel sinjoro! – kaj li ree turnis sin kaj komencis alvokadi la veturigistojn.

Korpulentulo ekploregis:

-Mi... mi... mi...

-Kion: mi... mi... mi...!? – subitiĝis la pastro. Je mia sankta Frane, mia granda s-a Frane, se vi eraros iom... se vi perdos la respekton al mi aŭ al iu el pastroj, aŭ se vi interbatiĝos kun la pli junaj, mi unue dorsfrapos vin kvindekfoje per nodbastono, poste mi igos ke vi, hastpaŝe, eliru el la monakejo kaj diros al vi: "Iru reen, leprulo, en vian brutejon!" Ĉu vi komprenis? Ĉar vi ĉiuj estas lepruloj kaj malbonaĵuloj, kiaj ne ekzistas en la tuta kristanismo. Vi estas pli malbonaj ol ortodoksulaĉoj.

-Ja kion vi plufaras, diablo vin forportu, ha? li turnis sin al la veturigistoj, vigle remantaj reen.

-Ni ne povis pli frue, patro! La ĉevalo ekfuriozis, ne volis eliri, sed senĉese piedbatis, piedbatis, kaj hufofrapis mueliston je la kokso!...

-Tii-el!? Kaj kio diable okazas al ĝi hodiaŭ? Kaj ĉu ĝi eliris sana?

-Jes, patro, sed la muelisto kuŝos almenaŭ dekkvin tagojn.

-Tii-el? Kaj ĉu ĉiuj pastroj estas ĉi tie?

-Jes, jen ĝuste ili estas sidantaj antaŭ la monakejo...

-Eniru ja! alkriis li al la nevo sidiĝante sur la poŭpon.

Korpulentulo ekfrotis la okulojn per la manplato kaj surpruiĝis. Post kiam ili alveturis al la rivermezo, li ekrigardis sube de si en la akvon, sed lia konscio turniĝis, kaj li kaptis la flankon. Tiel li sidis, kliniĝante je ĉiu demuriĝo, ĝis kiam denove reekis tiu birdblekado.

-Kio esta tio? Ĉu tio estas ia birdo? demandis li flustre la veturigiston.

-Tio estas granda sovaĝbesto, diras unu.

-Kiu vin formanĝos se vi ne gardos vin! aldonis la alia.

Korpulentulo minacstariĝis rigardante mokeme tiun monakejan kanajlon, ties striitajn blujajn pantalonojn, kaj poste deturniĝis, kaj kiam la ŝipeto eniris la havenon, li elsaltis kiel ĉashundo. La veturigistoj elkondukis Korpulentulon, kaj ekuŝis sub la saliko.

La onklo kaj nevo ekiris silente tra la kverkarbaron. Foliaro ankoraŭ ne troviĝis je maljunaj arboj, sed estis ankoraŭ multe da sekfolioj sur la novalo. Post kvindekda paŝoj, subite videblis la herbejo, kaj je ĝia fino, malantaŭ du vicoj de altaj trunkoj, altas veraj feaj kortegoj.

Tiel ekŝajnis al Korpulentulo, kiu haltis. Li malfermegis la buŝon kaj ekgapis.

-Vi kisos manon de ĉiu pastro kaj kliniĝos antaŭ ĉiu, ĉu vi komprenis min? Tii'el! Poste vi reiros kaj staros nudkapa, ĉu vi komprenis min? Tii-el! – diris la onklo ne rigardante lin kaj ekiris antaŭ li, iom pli rapide.

La okuloj de Korpulentulo gluiĝis al la monakejo kaj li ektimegis kiam multaj voĉoj ektumultis.

-Ĉiam Jesuo kaj Maria! frat'-Brne!

Kaj Korpulentulo havis ja kion vidi.

Sep pastroj sterne surbenkiĝis sub la nuksoarboj. Kaj kiaj ili estas, Dio tion prijuĝu! Al ili kvin ŝveliĝis la ventroj, al ĉiuj egale plendikiĝis la koloj, al ĉiuj egale pufas la vangoj, ĉiu malstreĉis la razitajn lipojn. Nur ili du estis maldikaj viroj.

-Ĉu tio ja estas via nevo? demandis la plej maljuna, levante la okulvitrojn de la nazo al la frunto.

-Jes, li estas... Nu, plenumu vian devon!

Korpulentulo kisis laŭvice sep manojn, kliniĝis sepfoje, kaj revenis al la antaŭa loko volvante la ĉapeton inter fingroj.

-Kaj kiom aĝa li estas, Brne?

-Dekdujara...

-Vi ŝercas, homo! Neeble!

-Ne estas eble, li estas pli aĝa! ripetis ĉiuj mire.

-Kredu ja, ke li ne estas eĉ dekdujara! kaj sidiĝinte li komencis ion itale al ili rakonti.

Frat'-Vice (monakejestro), frat'-Dume, frat'-Brne, frat'-Lovre, frat'-Ŝime, frat'-Jakobo, frat'-Bare kaj Frat'-Ante komencis interparolon interrompante kaj antaŭante unu la alian. Tiel ĉi la preĝejo ilin baptis, sed laŭ la popola bapto ili nomiĝis: Funelo, Onklino, Trogulo, Betulo, Balgo, Koleremulo, Vostvolvulo, Buŝaĉulo.

Estis ankoraŭ kelkaj monakejaj tonsuruloj, sed ili troviĝis "je gajnado" en la parokoj. Nur se iu malsaniĝas aŭ bezonas ripozon, li venas por kelka tempo "al la hejmo" el la paroko, kaj instaliĝos en ĝi nur post kiam jaroj ekŝarĝos lian dorson, kiel ĉe la menciita okopo. Tiuj ĉi, do, ĝuadis en paco tion kion donis la Dio kaj la s-a Frane.

Korpulentulo komencis trarigardi la monakejon. Ĝi estis unubaza, sed havis dudekon da fenestroj fasade. La preĝejo estas algluita al ĝi per sia blankigita fasado. La monakeja muro ne estas kalkumita, kaj sur ĝi oni vidas kvadratajn ŝtonojn, rondajn, ŝtonplatojn, ŝtonakraĵojn kaj brikpecojn. La malgrandaj fenestroj estas nek egalaj nek samvicaj, kaj, se ili ne estus eĉ kvadrataj, oni povus diri, ke kanonaj kugloj traboris la muron. La ŝutroj estas diverskoloraj kaj disfalas pro malnoviĝo.

De maproksime tiu konstruaĵo ŝajnis al ĉiu bela, ĉar ĝin spicas verdaĵaro, sed al Korpulentulo ĝi ankaŭ de proksime ne aspektis malbela.

Frat'-Brne senĉese babiladis itale rigardante la nevon, kaj kiam ankaŭ tio alfiniĝis, li komencis nialingve:

-Jen tiel! Mi ne aŭdis belajn vortojn pri li, sed se li ne kondutos bone, mi bat'! (li montris permane kiel li bastonbatos lin) kaj iru tien de kie li ankaŭ venis.

Tiam traporde aperis du diakonoj kaj tri lernantetoj en dalmaturbaj kostumoj.

(daŭrigota)

GREKAJ KAJ LATINAJ LINGVAJ ELEMENTOJ EN ESPERANTO

La legendoj el antikva periodo atestas ke eĉ tiam oni sentis la bezonon de iu interkomprenilo. Historie, oni scias la fakton ke dum unu periodo la latina lingvo estis internacia kumunikilo de eŭropaj diplomatoj, juristoj, scienculoj kaj administrantoj.

Bedaŭrinde, la latina tamen restis la lingvo de privilegiuloj kaj malproksime de simpla popolo.

La historio de planlingvoj komenciĝas eĉ pli frue ol en la XVII jarcento. El la tuta serio de latinidaj planlingvoj kaj projektoj ("Volapük", Occidental, Interlingva ktp.), Esperanto estas la sola ekde pli ol cent jaroj ĉiufanke praktikata planlingvo.

Parolante pri la unua lernolibro de Esperanto, ĝia kreinto L. L. Zamenhof mem sincere konfesas ke *li prenadis radikojn el la lingvo latina, kiel lingvo duone internacia...* Ĉi tie ni donas resuman trarigardon de latinaj kaj grekaj lingvaj elementoj en Esperanto.

En jam vere riĉa literaturo pri la internacia lingvo ĝenerale la plej konciza estas la opinio de la iama sovetunia ideologo V. I. Lenjin: „Esperanto estas latina lingvo de la proletaro". Tiamaniere li esprimis plurajn aspektojn - historian, socian, lingvistikan – de la internacia lingvo, aparte de Esperanto.

Historie, oni vidas la fakton ke en la formo de latina lingvo foje jam ekzistis la internacia interkomprenilo. Tio, do, montras ke eblas la solvo de internacia lingvoproblemo.

Socie rigardante, la mezepoka latina ne estis nacia sed klasa lingvo komuna al ĉiuj regantaj rondoj de eŭropaj nacioj. Uzante latinan en interrilatoj, ili vere uzis sian komunan, tute ne fremdan lingvon. Eĉ poste, kiam ekestis „grandaj naciaj lingvoj", oni ankaŭ uzis latinan kiel neŭtralan lingvon, tute ne ofendinte nacian senton de iu ajn ŝtato kaj nacio. Tamen, latina restis la lingvo de privilegiuloj, pro sia lingvistika karakterizo – kompleksa kaj malfacila gramatiko. Krom tio, al ĝi mankas pluraj modernaj kaj naciaj vortoj. Pri tio, nia konata esperantisto Tibor Sekelj, dum sia prelego pri historio de internacia lingvo, en popola universitato *Kolarac* en Beograd, sprite rimarkis: „Kiamaniere ni esprimus

en latina lingvo tiun ĉi serban frazon – *Ja nosim maramicu u džepu od pantalona* (Mi portas poŝtukon en la poŝo de pantalono), ĉar en la latina lingvo ne ekzistas vortoj *poŝo, poŝtuko, pantalono*".

Kontraŭe, simpligante latinajn lingvajn elementojn kaj unuigante ilin kun elementoj el pluraj modernaj kaj parolataj lingvoj, Esperanto jam de longe fariĝis logika kaj ege facila lingvo por la paŝtisto same kiel por la scienculo.

La historio de planlingvoj notas multajn provojn por krei facilan kaj universalan interkomprenilon. Unu el tiuj sciencaj vojoj estis revivigo aŭ simpligo de unu el tiel nomataj *mortaj lingvoj*: **sanskrito, hebrea, greka, latina**. Inter la unuaj tiaj projektoj estis „Macaronic–Latino” de la monako T. H. Folongo (1491-1544). Li simpligis mezepokan latinan lingvon aldonante italajn vortojn. Tiu kaj similaj provoj, krom iomete „Latino sine flexione” (1903, la verko de la itala matematikprofesoro Giuseppe Peano), neniam akiris praktikan signifon.

La glora franca filozofo Rene Dekart jam en la jaro 1629 skribis: „Estas tiom multaj interŝanĝoj de la opinioj inter la popoloj ke oni bezonas unu komunan lingvon”. Dekart estis inter la unuaj scienculoj kiuj opiniis ke eblas krei planlingvon. Li eĉ skizis ĝian ĝeneralan temon: „Tiu lingvo devus havi nur unu specon de la konjugacio kaj deklinacio...Ĝi entute ne devus havi nebezonatajn formojn kaj malregulecon. Konjugacion kaj vortkonstruojn oni devas krei pere de afiksoj, aldonante ilin ĉe la komenco aŭ ĉe la fino de la vortradiko. Tiuj ĉi afiksoj devus esti en la ĝenerala vortaro. Eĉ simplaj homoj, uzante tiujn vortojn, dum ses monatoj, libere povus regi tiun lingvon”.

Se Dekart donis nur la teorion fundamenton por la konstruo de logika filozofia lingvo, Lajbnic jam montris konkretajn metodojn de ĝia realigo. Pro tio multaj pensuloj de la homaro, de Lajbnic ĝis Jespersen, penadis malkovri leĝojn de la universala gramatiko kaj krei novan lingvon. Nome, ĉiam kiam natura fluo de la aferoj ne donas la solvon oni ekmarŝas sciencajn vojojn.

La projekto de Grosserie (*La langue internationale pacifiste* aŭ *Apolema*, Paris 1907), baziĝas sur la lingvo greka, ekz. *antrop.* – homo, *hipp.* – ĉevalo, *oreksia calo* – bona apetito...

Anglo L. Hogber 1943 publikigis la projekton „Interglossa”. En ĝi la vortoj plejnombro devenas el la greka lingvo, prenitaj el jam ekzistanta scienca kaj teknika terminologio: *geo* – tero, *gyna* – virino, *pyro* – fajro, *paleo* – antikva...

Sekvante la opinion de Zamenhof, ke *li prenadis radikojn el la lingvo latina, kiel lingvo duone internacia*, ni ĉi tie donas resuman trarigardon de tiuj latinaj kaj grekaj lingvaj elementoj en Esperanto.

Ni komencas per adverboj kiuj transprenis la latinan finaĵon *-e*, ekz. klar-*e*, long-*e*, ver-*e*. Kelkaj latinaj adverboj kaj konjunktioj estas simple ortografie esperantigitaj, nome retenis la saman formon: *jam, sed, tamen*; la aliaj iomete ŝanĝiĝis: nunc – *nun*, hodie – *hodiaŭ*.

La prefikson *mal-* oni rekonas ankaŭ en latinaj formoj *malus, male*. Ĉi lasta adverbo *male* esprimas la samon kiel la prefikso *mal-* : sobrius – *sobra*, male sobrius – *malsobra*.

Kelkaj prepozicioj latinaj senŝanĝe eniris Esperanton: *apud, de, inter, per, post, pro, sub, super, trans*.

La sufikso *-ar* estas trovebla samsence en latinaj vortoj *vocabularium* (vortaro), *lapidarium* (ŝtonaro), same kiel en la serbaj vortoj: *drvara, pekara*. Ankaŭ la latina sufikso *-an-* havas la saman sencon, ekz. *urbanus* (urbano). La sufikson *-ul-* ni rekonas en latina *bibulus* (trinkulo).

La plej multaj latinaj elementoj estas en esperanta konjugacio kies infinitivo finiĝas per *-i*, same kiel en deponenta, pasiva formo de latinaj verboj fonetike skribitaj: *sequi – sekvi, nasci – naski*. Multajn infinitivojn Zamenhof kreis laŭ la formo de participo perfekta pasiva, ekz. *confessus – konfesi, digestus – digesti, directus – direkti, electus – elekti, meritus – meriti, usus – uzi*. Aliflanke, ĉe multaj esperantaj verboj la infinitivon oni faras el la verba radiko latina: *am-are – ami, vid-ere – vidi, scrib-ere – skribi*. Kelkaj infinitivaj formoj devenas el substantivoj : *opini-i* (de opinio), *imag-i* (de imago). El la adjektivo *minax* en ĝia genitiva formo *minac-is* ekestis la verbo *minac-i*.

La plej grandan plifaciliĝon Esperanto atingis en konjugacio simpligita je tri finaĵoj: **-as** (prezenco), **-is** (perfekto), **-os** (futuro). La prezenca finaĵo **-as** devenas el la dua singulara persono de la unua konjugacio latina: *lauda-as* (esp. mi, vi, li laŭd-**as**). Analoge al tiu ĉi formo Zamenhof agis sammaniere ĉe la kreado de ceteraj du finaĵoj: **-is** kaj **-os**. Li vere rimarkis ke la vokalo *-i-* karakterizas preskaŭ ĉiujn personajn formojn (krom la tria en pluralo) de latina perfekto, en la konjugacio de ĉiuj aktivaj verboj. Logike restis trovi karakterizan finajxon por la kreado de formo signifikanta la estontecon. Ĉiu latina verbo de la unua kaj la dua konjugacioj posedas la finaĵon **-o-** en la unua persono de singularo: *laudab-o* (mi laŭdos), *studeb-o* (mi studos).

La participa finaĵo **-ant** estas trovebla en la genitivo de latina participo prezenca – *laudantis*. Analoge Zamenhof kreis modelajn participajn formojn de pasinteco **-int** kaj estonteco **-ont**: ekz. *laŭdanta, laŭdinta, laŭdonta*.

La sufikso **-end** laŭforme kaj laŭsence kongruas kun la gerundivo latina, ekz. – liber **legendus** est – la libro estas **legenda**. Analoge estas farita la sufikso **-ind**, laŭ**dinda** afero.

La sufikso **-in** havas la saman sencon en latinaj vortoj **regina** (reĝino), **gallina** (kokino), sed mi opinias ke vera ĝia fonto estas el la greka vorto γυνή, **gine** – **virino**.

Esperanta akuzativo ricevis la grekan finaĵon **-v** (φίλον – amikon).

La sufikso **-id** similas al la finiĝo latina en samsignifaj vortoj **Danaides** – Danaï filiae – **Danaidoj**.

En *Naŭlingva etimologia leksikono*, sub la vorto **osto** ni legas nur slavan similan vorton (*k*)**ost**, sed mi trovas ke la fonto de tiu ĉi esperanta vorto - **osto** estas malnova greka οστόν (**ost**-un), precipe ĉar latinaj formoj estas **os**, pl. **ossa**.

Pri la vorto **kaj** mi legas malgrandan historion en *Lingvaj demandoj* de Zamenhof. Nome, al unu sinjoro „kiu skribis ke nia lingvo estas tre bona, bonega, sed nur la vorto **kaj** forte malplaĉas al mi, tiel malplaĉas, ke li sendis al ni promeson, ke li ellernos nian lingvon kun la kondiĉo, ke ni elĵetu la vorton **kaj**. Zamenhof respondis jene: „La vorto **kaj** ne sole estas maloportuna, sed ĝi ankaŭ tute ne estas arbitre elpensita (ĝi estas vorto greka – la latina **et**). Sekve, la motivoj kontraŭ **kaj** estas tiel bagatelaj, ke eĉ en la tempo de la kreado ni devus preni **et**, **e** anstataŭ **kaj** nur tiam, se la uzebleco de ambaŭ formoj estus egala sed ilia uzebleco ne estis egala: dum la vorto **kaj** estas tute libera, la vortoj **e** kaj **et** estis necesaj por la finiĝo de l'adverbo kaj por la sufikso de malgrandeco, por kiu ni *ne povis* doni aliajn vortojn (uzi tiun saman formon por finiĝo gramatika aŭ sufikso kaj sendependa vorto ni ne povis, ĉar laŭ la konstruo de nia lingvo (pro la senlerna uzebleco de la vortaro) la finiĝoj kaj sufiksoj estas sendependaj vortoj". Citante tiun ĉi lokon mi volus montri samtempe genian kaj logikan vojojn de la kreado de Esperanto.

La kondiĉojn en kiuj evoluas la internacia lingvo oni ne povas kompari kun la samaj en naciaj lingvoj, nome en aliaj naciaj uzoj, sed kun naciaj lingvoj en ilia internacia uzado. Historia ekzemplo por tiu ĉi komparo estas la nuntempa funkciado de Esperanto kompare kun la funkcio de mezepoka latina lingvo. Latina lingvo tiam ne plu havis socian portanton (en etnografia senco); ĝi ege ŝanĝiĝis kaj rolis kiel neŭtrala internacia lingvo en tuta Eŭropo. Tio signifas ke internacia lingvo eblas. Nome Esperanto, havante verajn lingvistikajn kvalitojn, povas respondi je ĉiuj sociaj devoj. Per fenomeno Esperanto la problemo de internacia lingvo estas lingvistike solvita. Kiel diris la franca lingvisto A. Meillet: „La homo aktive ĉeestas en la kreado, funkciado kaj evoluo de la lingvo kaj en tio estas almenaŭ tiom da artefaraĵoj, kiom en planlingvoj kies elementoj estas prenitaj el vivantaj lingvoj kaj kiuj estas faritaj statistike".

Batalante kontraŭ lingva imperialismo de grandaj kaj fortaj nacioj, Esperanto-movado kaj Esperanto-lingvo prezentas tute novan koncepton de humanismo kaj de la universaleco de la mondo. „La voĉo de konzervativuloj obstine asertas ke Esperanto estas utopia entrepreno. La vero, laŭ la naturaj leĝoj kreskanta realeco, ne rapidante, sed ĉiam plej certe refutas la opinion de konservativuloj" (M. Gorki).

Esperanto ĉiam pli kaj pli altiras la atenton kiel lingvo kiu serioze pretendas ekesti universala por la internacia interkompreniĝo. Ĝi revivigas la ideon tiom grandan kaj fundamentan por plua evoluo de la civilizo kiu al homoj sen Esperanto aspektas terure timiga, eĉ ne realigebla.

L i t e r a t u r o

1. Louis Bastien, *Naŭlingva etimologia leksikono*. The Esperanto Publishing Company LTD. Anglujo, 1950.

2. D. Blanke, *La antikvaj lingvoj kaj la problemo de internacia monda helplingvo*. „Scienca revuo", vol. 26, N-ro 4/5 (114/115), 1975, p. 125-129.

3. Franjo Modrijan, *Elementoj latinaj en Esperanto*. Ljubljana 1940.

4. L. L. Zamenhof, *Lingvaj respondoj, konsiloj kaj opinioj pri Esperanto*, E. F. E. 1962.

5. E. Dresen, *Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj de serĉado*, dua eldono. Leipzig 1931.

6. G. Peano, *De Latino sine flexione*. La Revue de Mathematique, N-ro 8, 1903.

7. D. B. Gregor, *La fontoj de Esperanto*. „Scienca revuo", N-ro 9, 1958.

Dr-o Miodrag Stojanović



Informoj

Beogradaj esperantistoj en Parizo

Grupo da esperantistoj fervojistoj kiuj partoprenis Kongreson de IFEF en Parizo vizitis la oficejon de SAT la 14an de majo. La ĝenerala sekretario Krešimir Barković sendis al ni foton de Radmila, Mira, Velibor, Tereza kaj Boba antaŭ la sidejo de SAT.

Dimitrije Janičić



Renkontiĝo de serbaj esperantistoj

Esperantistoj el Jagodina, urbo en suda Serbio, tradicie organizis **Majan renkontiĝon de esperantistoj el Serbio**. Esperanto societo el Jagodina portas nomon de Svetozar Aĝić, unu el la plej malnovaj esperantistoj en Serbio. Renkontiĝon partoprenis geesperantistoj el Jagodina, Beograd, Niš, Zaječar kaj Leskovac. Partoprenis prezidanto (s-ro Miodrag Nikolić) kaj sekretario (s-ro Adem Jakupović) de SEL. Geesperantistoj organizis kulturen programon, interparolis pri organizaj problemoj, novaj kursoj, aperigado de publikaĵoj, pri pli oftaj similaj renkontiĝoj kaj pri ebleco havi pli da junuloj, ĉar nunaj membroj de Esperanto-movado en Serbio estas plejparte maljunaj homoj.

Komunumo Jagodina lastjare helpis laboron de la E-societo, diris prezidanto Nikola Ilić, kiu atendas pli bonajn tagojn por societo kiu alproksimiĝas al centjara datreveno de unuaj esperantistoj en ilia urbo.

Komuna kultura programo, amikaj kontaktoj, kunlaboro kun revuo **Beograda verda stelo**, novaj kursoj, certe alportos pli aktivajn esperantajn tagojn por serbaj esperantistoj.

Dimitrije Janičić

Skribite per fotoaparato



De maldekstre – d-ro Miodrag Stojanović, d-ro Pribislav Marinković, Boriša Milićević, mag. Gvozden Sredić, Zlatoje Martinov kaj Adem Jakupović (Dimitrije Janičić kaŝis sin malantaŭ la fotoaparato)

ASEMBLEO DE E-INSTITUTO.– Membroj de Esperanto-Instituto de Serbia Esperanto-Ligo dum la regula jarkunveno interparolis pri sia laboro en la jaro 2006 kaj pri venontaj taskoj de institutanoj. Bedaŭrinde, kunvenon partoprenis nur prezidanto Boriša Milićević el Novi Sad kaj institutanoj el Beograd. Aliaj membroj ne partoprenis pro multtekosta vojaĝo kaj sanproblemoj.

La plej grava problemo de la Instituto kaj ĝenerale Esperantomovado en Serbio estas – manko de pli junaj membroj. Esperanto ne estas produktiva kiel angla, sed en kondiĉoj de liberala kapitalismo – hobiaj restas nur al pensiuloj kaj riĉuloj.

D. J.

En Serbio venontjare

UNUA KONGRESO DE SERBIAJ ESPERANTISTOJ

Sabaton la 11an de aŭgusto, en Jagodino, urbo de la suda Serbio (bona domastro estis Jagodina E-societo), okazis kunsido de Prezidantaro de Serbia Esperanto-Ligo. La plej grava temo estis organizado de la Unua kongreso de serbiaj esperantistoj. La Kongreso okazos de la 1a ĝis la 4a de majo venontjare.

Ĉeforganizanto de la Kongreso estos Esperanto-societo "Ĉele Kula" – Niŝ. Oni atendas partoprenon de ĉirkaŭ 200 serbiaj esperantistoj kaj gastoj.

Por la Kongreso E-societoj kaj E-Instituto preparas faka kaj kultura programoj.

– Protektanto de la Kongreso estos ĉefurbestro de Niŝ kaj la organizadon helpos kelkaj firmaoj el Niŝ kaj Serbio – diris al ni *Mirjana Nikolić* en la nomo de la Organiza komitato kies membroj partoprenis kunsidon de Prezidantaro.

Dimitrije Janičić

Novaj esperantistoj

La 8-an de junio 2007 A-ekzamenon faris Bjelotomić Jovan kaj Janjić Stefan, ambaŭ bonegaj lernantoj de la 7-a klaso de elementa lernejo por lernantoj kun difektita vidpovo. Ili ambaŭ lernis Esperanton en la lernejo libervole. Ilia instruistino estis Etelka Kiš-Jakupović, kiu en tiu lernejo senpage instruas Esperanton kvardekon da jaroj.

Bjelotomić Jovan estas tute blinda kaj Janjić Stefan uzas restvidpovon kaj povas legi presitan kaj skribitan tekstojn. La ekzameno konsistis el skriba kaj parola partoj. Ambaŭ ekzamenitoj faris la ekzamenon kun bonega sukceso.

Ambaŭ lernantoj tre aktivis en E-sekcio de la lernejo. Ili recitis (esperantlingve) en lernejaj aranĝoj, aranĝoj en salono de Ligo de blinduloj kaj en Etnografia muzeo en Beogrado, kie oni okazigis solenan rememorigon pri Zamenhof (okaze de 90 jaroj de lia morto).

Adem Jakupović

Voĉoj por paco en la mondo

OSIOKA Taeko, urbano de Hiroŝimo, instruistino de elementa lernejo, prelegis en ZAIM (subkongresejo Eroŝenko) pri kelkaj reagoj pri la Internacia Virina Tago Hiroŝimo.

De antaŭ 6 jaroj laŭ ŝia propono la Plenum-komitato de la Tago sendas leterojn en Esperanto al la mondo en diversaj temoj. Ĉi-jara laboro okazis en la temo: “La senmilitan morgaŭon al la infanoj” kaj ŝi petis al adresitoj, ke ili prezentu siajn spertojn pri la milito. Venis 158 respondoj el 50 landoj. Ŝi ĝojas, ke la komitatanoj eksciis, ke Esperanto estas tiel utila kaj forte ligas homojn en la mondo.

OSIOKA Taeko en 30-minuta programo la 6-an, 9-an kaj 10-an en ZAIM sinsekve prezentis kelkajn leterojn, kiuj inkluzivas la leterojn el Koreio (spertinto de Korea-milito), el Kongo (spertinto de interna milito), el Serbio-Montenegro (poemoj verkitaj sub aeratakoj en eksa Jugoslavio) kaj el aliaj landoj.

Dimitrije Janičić

LANDO DE ĈIJARA UEA-KONGRESO (INTERESAĴOJ)

* Japanio estas insula lando, kiun faras kvar grandaj insuloj: Hokaido, Honŝu, Ŝikoku kaj Kjuŝu.

* Japanio estas konstitucia monarkio. Caro signifas unuecon de japanoj.

* Japana teknologio estas la dua en la mondo, post la usona, kaj komerco estas la tria, post la usona kaj ĉina.

* Japanio fiŝkaptas ĉirkaŭ 15% de monda fiŝkaptado.

* Vulkano kaj montaro Fuĝi („fajro“) alta 3.780 metrojn estas tre konata emblemo de la lando.

* Sakura (ĉeriza floro) estas japana nacia floro. Mallonga daŭro de tiu floro signifas efemerecon de homa vivo.

* En Japanio oni uzas tri abocojn (manierojn de skribado):

a) kanĝi – ĉiuj ideogramoj

b) hiragana – japana aboco

c) katakana – skribado de strangaj vortoj.

* En Japanio jare okazas ĉirkaŭ 1.500 sismaj eventoj (tertremoj, tifonoj kaj eruptoj de vulkanoj).

* Nacia japana trinkaĵo estas **sakeo**. Tio estas vino de rizo.

* Japane oni diras Vivu – Kampai. Tio signifas "Ĝis fundo".

* Japanaj trajnoj estas konataj pro sia rapideco. Ili veturas ĝis 265 kilometrojn hore. Ili estas sekunde precizaj. Jara malfruiĝo de ĉiuj japanaj trajnoj estas 12 sekundoj.

* De 720.000 industriaj robotoj en la mondo – 410.000 estas en Japanio.

* **Obeŭto** estas skatolo por tagmanĝo. Preparo de obeŭto estas aparta arto.

Dimitrije Janičić

Esperanto-kurso

(наставак)

Одређени члан

У есперанту постоји одређени члан који гласи la и за једину и за множину. Члан се употребљава када се ради о познатој одређеној ствари, животињи или особи.

La biblioteko estas granda kaj bela. -Библиотека је велика и лепа.
La broŝuro estas malgranda. -Брошура је мала.
La ĉampiono sidas kaj la ĉampionino staras. -Шампион седи, а шампионка стоји.

О употреби и неупотреби одређеног члана говорићемо подробно касније.

∴

Ekzerco

ĉu?	= да ли?	jes	= да
ĉu ne?	= зар не?	ne	= не
kaj	= и, а	en	= у
sed	= али, него	loĝi	= становати
kia	= какав	tia	= такав, онакав, -а, -о
tia ĉi	= овакав, -а, -о	menso	= ум, памет
korpo	= тело	patro	= отац
filo	= син		

- Sinjoro, ĉu vi estas ŝoforo? - Jes, sinjorino, mi estas ŝoforo.
- Kaj ŝi? - Ŝi estas profesorino.
- Ŝi estas via kamaradino, ĉu ne? - Ne, ŝi ne estas mia kamaradino.
- Ĉu viaj amikoj loĝas en strato Dunavska? - Jes, ili loĝas en ĝi.
- Kia estas ilia strato? - Ĝi estas mallarĝa, sed bela.

Proverboj

Sana menso en sana korpo. Kia patro, tia filo. Kia patrino, tia filino.

∴

Кад научимо бројеве од 1 до 10, те 100, 1000, милион и милијарду, моћи ћемо да састављамо било који одређени број.

unu	= један, -а, -о	ok	= осам
du	= два	naŭ	= девет
tri	= три	dek	= десет
kvar	= четири	cent	= сто
kvin	= пет	mil	= хиљаду
ses	= шест	miliono	= милион
sep	= седам	miliardo	= милијарда

Сада да сложимо неколико бројева:

dekdu	= дванаест	dudek	= двадесет
deknaŭ	= деветнаест	okdek	= осамдесет

mil naŭcent sepdek kvar = хиљаду деветсто седамдесет четири

∴

Редни бројеви се добијају додавањем придевског наставка –а:

unu	unua	-први, а, о
dek	deka	-десети, а, о
cent	centa	-стоти, а, о
du	dua	-други, а, о
-	alia	-(неки) други, ини, а, о

Уз редне бројеве употребљава се, по правилу, члан la:

la unua	-први, а, о
la centa	-стоти, а, о

∴

Множина именица, придева, присвојних заменица и редних бројева добија се додавањем наставка –j:

avo	-деда	avoj	-дедови, деде
avino	-баба	avinoj	-бабе
frato	-брат	fratoj	-браћа
fratino	-сестра	fratinoj	-сестре

sana avo
bona avino
lia frato
ilia fratino
la unua tago

sanaj avoj
bonaj avinoj
liaj fratoj
iliaj fratinoj
la unuaj tagoj

∴

Кад се дода на корен речи, суфикс -ist означава одређено занимање или присталицу доктрине или покрета:

poŝto	-пошта
poŝtisto	-поштар, поштански радник
poŝtistino	-поштарка, поштанска радница
labori	-радити
laboristo	-радник
laboristino	-радница
Esperanto	-есперанто
esperantisto	-есперантиста
esperantistino	-есперантисткиња

Сама реч isto значи: професионалац.

∴

Суфикс -ism означава систем, доктрину, покрет:

kapitalo	-капитал	kapitalismo	-капитализам
Markso	-Маркс	marksismo	-марксизам
romantika	-романтичан, занесењачки, а, о	romantismo	-романтизам

∴

Додат на корен речи, суфикс -ejo означава просторију или простор за оно што је у корену речи:

lerni	-учити	lernejo	-школа
libro	-књига	librejo	-књижара
kafo	-кафа	kafejo	-кафана
kuiiri	-кувати	kuirejo	-кухиња

Ejo значи: просторија.

Бориша Милићевић

(наставиће се)

Amuzo

Ridindaj anoncetoj

Bonega kaj malmultekosta restoracio. Bonegaj manĝaĵoj servitaj de kelnerinoj en apetitodona formo.

Specialaĵoj por vespermanĝo: meleagraĵo 3,00 €, kokidaĵo aŭ bovaĵo 2,50 €, infanoj 2,00 €.

Travideblaj ŝtrumpoj faritaj por uzo kun belegaj roboj, sed tiel belaj, ke multaj virinoj portas nur ilin.

Uzitaj aŭtomobiloj. Kial iri al alia loko por esti trompita? Venu al ni!

Ne ŝiru viajn tolaĵojn en viaj lavmaŝinoj! Ni faras tion zorgeme permane.

Aĉetu iujn tre malnovajn robojn de avino en bonega stato.

Duonjara postkristnaska disvendo.

Oni vendas hundon. Ĝi manĝas ĉion kaj ŝatas infanojn.

Mi vendas stebitan seĝon kiu povas transfomiĝi en tablon, noktan poton, balanc-ĉevalon, fridujon, printempan mantelon grandeco 8 kaj peltan kolumnon.

Ĉu vi estas analfabeto? Skribu al ni kaj ni helpos senpage.

Restoracio funkcias sep tagojn semajne kaj semajnfine ankaŭ.

Kompilis Adem Jakupović

Lingva baro

Du laboristoj ĉe auto-ŝoseo laboris konstruante novan benzin-stacion. Subite haltis granda aŭtomobilo kun diplomataj signoj kaj la ŝoforo malfermis la fenestron kaj demandis:

“Parlez-vous français?”

La du laboristoj nur rigardis lin sen kompreno.

La ŝoforo tiam demandis: "Sprechen Sie deutsch?", sed la laboristoj ne komprenis.

Sekvanta demando estis: "Fala português?" Ankaŭ tion la laboristoj ne komprenis.

Fine la ŝoforo demandis: "Parlate italiano?" Denove nenia respondo de la laboristoj.

Vidante ke ili lin ne komprenas, la ŝoforo forveturis.

Unu el la laboristoj turnis sin al la alia kaj diris: "Eble ni devus lerni iun fremdan lingvon..."

"Kial? Vi vidis, ke tiu homo parolas kvar lingvojn, sed tio tute ne helpis al li."

Gazetaj titoloj

Kompetentulo diras, ke dum la aviadilofalo io ne funkciis bone
Sekskuniĝo inter pandoj ne funkciis, la aferon transprenos
veterinaro

Se oni ne ĉesigos strikon baldaŭ, ĝi povos daŭri pli longe

Esplorstudo montris ke pli grandaj kanguruoj saltas pli longe

Reklamoj pri alkoholaj trinkaĵoj plivastigas drinkadon

Tomatoj kutime estas grandaj, malgrandaj aŭ mezaj

Konsilo: estu bone vestigita kiam ekstere estas malvarme

Ekonomisto uzas teorion por ekspliki ekonomion

Aŭtomobiloj mortigas 110 personojn tage – ni strebas plibonigi la
rezulton

Ondo de malvarmeco estas ligita kun temperaturo

Duono de mezlernejoj en Usono postulas iom da studado por
diplomeksamenado

Blinda virino ricevis renon de sia patro, kiun ŝi ne vidis multajn
jarojn

Atestanto diras ke la aviadilo estis nur kelkajn metrojn super tero
antaŭ la falo

Kompilis Adem Jakupović

Anekdoto – Stevan Sremac pri impostoj

Fama serba verkisto Stevan Sremac estis foje en societo, en kiu oni parolis pri impostoj. Li certan tempon silentis, sed subite li diris:

- Mi opinias, ke el ĉiuj impostoj la plej monodona estus imposto pro virina beleco

- Kial vi opinias tion?

- Ĉar ĉiu virino tre volonte pagus la imposton.



Legantoj skribas

Kara Dimitrije!

Dankon por la gazeto Beograda Verda Stelo, januaro-aprilo 2007, n-ro 1 (2). Tre plaĉas al mi la poemoj, la amuzaĵoj (precipe la anekdoto pri Aleksandro kaj Diogeno, la rakonto "Infera biblioteko" kaj la artikoloj pri la utileco de Esperanto, pri Rigas Fereos kaj pri Stevan Stratimirović). La ĉi-lastaj du artikoloj ebligis al mi interesan enrigardon en la historion de la sudorienta Eŭropo. Laŭ mi la gazeto prezentas buntan bukedon de poezio, prozo, historio kaj krome informoj organizaj kaj Esperantomovadaj. Gratulon!

Multajn salutojn

Andreas Kueck
Germanujo



In memoriam

La 22-an de junio ĉi-jare mortis plurjara membro de E-societo „Branko Rajšić“ en Zemun s-ano Dušan Vorkapić. Li naskiĝis la 12-an de julio 1925 en Vorkapići (ĉe Topusko en Kroatio). Li lernis fotografistan metion de 1939 ĝis 1942 kaj de 1950 laboris en fotoateliero „Rave“, kies posedantoj estis unue Branko Rajšić kaj post lia morto Dušan Vorkapić. Li emeritiĝis en 1996.

Esperanton li komencis lerni en 1962 en E-societo en Zemun kaj ĉiam estis fervora membro de la societo. Liaj ŝatokupoj estis, krom Esperanto, fiŝkaptado kaj pentrado.





La 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Roterdamo, Nederlando de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008

La 60-a kongreso de IFEF okazos en Poznań, Pollando de la 17-a ĝis la 24-a de majo 2008.

La 1-a kongreso de serbiaj esperantistoj okazos de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2008 en Niška Banja